Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 27 - trimonata

1/97

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Willeman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836

Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

El la enhavo

Novjara salutmesaĝo de la prezidanto (Duncan Charters) 1
Bernard Golden: *La didaktika valoro de teatraj verkoj* 2
Gabriella Horváth: *Analizado de la periodaĵo IPR (parto II.)* 6
Li Weilun: *Kiel klarigi vortojn* 11
Katalin Smidéliusz: *Ni testu niajn testojn* 13
Landoj kaj sekcioj 15
Katalin Smidéliusz: *Projekto KLERA* 22
Sabine Trenner-Erika Tóth: *Spertoj de internacia infana interŝanĝo* 24
Protokolo de Vanelkibico (s.n.) 27
Reagoj (A. Victor, U. Hukstra) 30
Alvokoj, Korekto, Ni kondolencas, Leterkesto, r. gratulas 31
Recenzoj (W. Blanke, Priester) 34

Estraro de la ligo

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5465. Internet: charters@prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*
Vicprezidanto: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. *Planado.*
Sekretario: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. Internet: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*
Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. kaj fakso +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*
Membro: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*
Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Instruado de infanoj.*
Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI.*
Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (36 23) 363-280. *Eldonado*
Observanto (UEA): Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

Novjara Salutmesaĝo de la Prezidanto de ILEI

Karaj kunlaborantoj,

Kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, la estraro de ILEI jam estos kunsidinta en Parizo por pridiskuti la laboron faritan dum 1996 kaj plani por 1997 kaj la fino de nia jarmilo. Ni certe konstatos konkretajn atingojn en nia laboro, inkluzive membroaltiĝon, utilan eldonadon kaj antaŭeniron de diversaj projektoj. Ni realece rigardos niajn laborfortojn kaj monrimedojn por maksimume profiti la eblecojn kiuj staras antaŭ ni. Harmonia kaj efika kunlaborigo de personoj el ĉiuj partoj de la mondo restas defio, tamen ju pli da kolegoj aperas ĉe "la reto", des pli faciliĝas tiu tasko. Iam dum 1997 ni atendas ke ILEI havu propran retadreson en la TTT (Tut-Tera Teksaĵo), kio daŭre helpos la komunikadon pri niaj celoj kaj projektoj.

Ni dankas al niaj aŭstraliaj samideanoj kaj al la prezidanto de UEA pro ilia interesiĝo kaj inteligenta planado por la Melburna konferenco de ILEI, kaj ni jam komencas prilabori planojn por 1998 kiam okazos la U.K. en Montpellier. Post Mazi, venas alispeca internacia videokurso kiu same kiel Mazi bezonos financan subtenon, kaj la perspektivoj estas helaj por pli da komputilaj programoj kiuj helpos en la instruado de Esperanto.

Ni daŭre laboras por ne perdi la impeton de la organizado de lernejoj kaj instruistoj kiu okazis ĉirkaŭ la projekto "Fundapax". Efektive, venis al ni proponoj por pluraj iniciatoj kiuj ŝajnas realecaj kaj subtenindaj, do al tio ni dediĉos apartan atenton. Ni kapablas demonstri la utilon de Esperanto por la ĝeneralaj celoj de la mondaj eduksistemoj, kaj pro tio urĝas konkretigo de pliaj eksperimentoj kiuj aldonos al niaj argumentoj restante sur bone fundamentita esplorbazo.

Mi ne menciis individuojn en ĉi tiu mesaĝo, ĉar tion farante mi riskus ellasi nomojn de personoj egale meritplenaj kaj projektoj nepre priraportindaj. Sed min inspiras la talento kaj dediĉiteco de niaj kolegoj en ILEI kaj la movado ĝenerale, kaj mi deziras al ĉiuj danki pro la alporto de tiuj kvalitoj. Ne hezitu daŭre sendi ideojn kaj proponojn al nia sekretariino, kaj ni povos relative komuniki tiajn al aliaj kiuj helpos ilin prijuĝi kaj efektivigi. Kaj kompreneble praktikajn artikolojn por IPR por helpi al ni pli efike instrui la lingvon.

Per tio mi finas, kelkaj horojn antaŭ forflugo al Parizo, kaj deziras al ĉiuj membroj de ILEI inspiran kaj fruktodonan jaron de kunlaborado al niaj reciprokaj celoj.

***Duncan Charters**, Prezidanto de ILEI*

Bernard Golden

LA DIDAKTIKA VALORO DE TEATRAJ VERKOJ

Centjariĝo de la esperantlingva teatro

En septembro 1996 okazis la centjara datreveno de la unua teatro-prezentado en E-o. La komedio *Unua brandfarìsto aŭ kiel diableto meritis pecon da pano*, verkita de Lev Tolstoj en 1886, estis esperantigita en 1896 kaj samjare en septembro surscenigita en Smolensk, Rusio, fare de membroj de la loka grupo[1]. Post tiu epokfara premiero, la esperantlingva teatro evoluis en pluraj landoj kaj sur ĉiuj niveloj. Mondaj klasikaĵoj de la teatra ĝenro estis tradukitaj, originalaj verkoj estis publikigitaj, kaj prezentaĵoj okazis kadre de lokaj societoj, teatraj festivaloj, kaj ankaŭ landaj kaj internaciaj kongresoj. Partoprenis amatoraj kaj profesiaj aktoroj kaj reĝisoroj. La historio de tiu vigla teatra vivo en Esperantujo estas dokumentita en tri detalplenaj kajeroj fare de Zofia Banet-Fornalowa[2].

D-ro Zamenhof mem tre frue montris interesiĝon pri teatra agado inter esperantistoj. En letero, kiun li sendis en 1903 al Carlo Bourlet, la redaktoro de *La Revuo*, la aŭtoro de la lingvo esprimis sian opinion, ke migranta teatra trupo estus la plej efika maniero fari propagandon pri E-o. Hodiaŭ internaciaj kaj lokaj periodaĵoj konstante informas la e-istaron pri surscenejaj eventoj, kaj ĉiujare novaj dramverkoj aperas libroforme.

Sur la tereno de la lingvoinstrua metodiko pluraj fakuloj alte taksas la didaktikan valoron de la drama ĝenro en lernejoj por faciligi lernadon de E-o. Ne mankas publikigita materialo en la formo de skeĉoj kaj teatraĵetoj por uzo de instruantoj kaj grupgvidantoj, kaj eblas legi en la Esperanta gazetaro entuziasmajn raportojn pri sukcesa utiligo de tiu materialo.

Tipologio de teatraj prezentaĵoj

En sia artikolo *Teatro por klubvesperoj*[3], Eduard Tvarožek pritraktas la funkcion de teatraj prezentaĵoj kiel programeroj de klubaj kunvenoj, kaj liaj konsiloj estas facile aplikeblaj al la lerneja situacio. Jen resumo de lia priskribo de la diversaj ŝtupoj karakterizantaj la agadon de neprofesiaj surscenigantoj kaj aktorantoj.

Ĉe la unua ŝtupo estas la teatro de unu aktoro, kiu ofte estas humura kabaredaĵo, sed ekzistas ankaŭ seriozaj monodramoj kun literatura valoro. Tvarožek nomas la pupteatron teatro de unu kaj duonaktoro, en kiu la pupo anstataŭas duan aktoron. Ĉi-speca teatro estas bone konata en lernejoj, kie plej ofte estas uzataj manpupoj faritaj - kune kun la dekoracio - de la lernantoj mem. Pupisto devas havi kapablon modifi la voĉon por krei la personecon de la dua rolanto. Se li havas talenton, li povas moduli sian parolmanieron kaj voĉtonojn diversforme por aldoni pli da rolantoj al sia pupteatraĵo. La enhavo de pupteatraĵoj povas baziĝi sur tute originalaj temoj, ŝercoj kaj anekdotoj kaj ankaŭ sur reverkitaj versioj de konataj fabeloj aŭ popolrakontoj. La dekoracio povas esti tre simpla, nur sufiĉa por doni la etoson de la lokoj de agado.

La sekva ŝtupo estas la skeĉo, en kiu la nombro de aktoroj estas senlima sed optimume varias inter du kaj kvar. Enhave kaj teknike la skeĉo similas al la pupteatraĵo, kvankam kelkfoje la intrigo ne estas komedia sed prezentas tragedian temon. La dekoracio, eĉ se ĝi estas minimuma, devas servi por stimuli la imagpovon de la spektantoj.

Variaĵo de aktorado ĉe tiu ĉi ŝtupo estas la improvizita skeĉo. Du aŭ tri volontuloj elpensas intrigon kaj, sen antaŭe verkita teksto, provludas unu aŭ du fojojn kaj poste prezentas sian skeĉon al la ĉeestantoj, kiuj siavice faras la samon. Dum mia restado antaŭ kelkaj jaroj en Kulturdomo Grésillon, mi partoprenis en la aranĝado de improvizitaj skeĉoj kaj konstatis, ke ĝi estas tre valora programero, ĉar ĝi instigas la ĉeestantojn al aktiva uzo de la parola lingvo. Ankaŭ nun en Grésillon la organizantoj utiligas skeĉojn por helpi partoprenantojn perfektigi sian lingvouzon. En la rubriko "Nia Filmo" de *Heroldo de Esperanto* (13/1995, pĝ. 2) fotoj 1 kaj 2 montras aktorantojn en skeĉoj, kiuj venis el la libroj de Bertram Potts[4] kaj Robert Mackay[5].

La pli altaj ŝtupoj laŭ klasifo de Tvarožek estas la prezento de kompletaj unuaktaj kaj pluraktaj komedioj. La plej efika prezentado de tiuj ĉi postulas teatron aŭ almenaŭ salonon kun podio, kurteno kaj rimedoj por variigi la lumigadon de pli komplika dekoracio. Geaktoroj en ĉi-specaj teatraĵoj povas esti pli multenombraj; ili devas surporti kostumojn kaj esti lerte ŝminkitaj.

Funkcioj de dramoj en lernejaj situacioj

En fakverkoj pri metodiko de fremdlingva instruado estas emfazite, ke la instruanto devas okazigi kondiĉojn por malbremsi perceptadon kaj memoron per kreo de pozitivaj afekciaj procezoj. Temas specife pri amikeca, netimiga kaj senstreĉa traktado de lernantoj. Kutimaj lecionoj pri gramatiko disvolviĝas en atmosfero de daŭra, streĉa atentado. Devas okazi ankaŭ periodoj de spontana atentado kaj ripozigo per ludado, kantado kaj stimulado de korpaj moviĝoj. Ĝuste tiun postulon de la instrua laboro plenumas ludado de roloj kaj dramigo de simplaj teatraj pecoj. La plej facila maniero fari la transiron de la lernoĉambro al la imagplena mondo de la scenejo estas per dramigo de lernolibraj legaĵoj, se en la tekstoj troviĝas agantaj personoj.

Lernantoj kun granda ĝuo transprenas rolojn de aliaj homoj kaj eĉ bestoj, kaj ili vivigas la legaĵojn en dialoga formo. La bezono parkerigi kaj flue eldiri frazojn en la lernata lingvo havas la efikon elimini la timon malfermi la buŝon, kaj lernantoj rigardas la fantazian mondon de la teatra scenejo kiel formon de malstreĉiga ludado.

Jozefo Horváth faras konkretan proponon apliki tiun ĉi instrumetodon por aktivigi

lernantojn per utiligo de la enhavo de la Asteriks-komiksaj libroj[6]. Ĉar la bildrakontaj tekstoj konsistas plejparte el dialogoj, ili estas tre facile adapteblaj por surscenigo kiel skeĉoj. Apartaj instrukcioj ne estas bezonataj, ĉar la bildoj mem montras la agojn, kiujn la aktoroj devas imiti. Ĉio dependas de la fantazio de la lernantoj kaj la lerteco de la instruanto, kiu rolas kiel reĝisoro. La neludeblajn partojn kaj klarigojn en la teksto oni povas rakonti.

Aŭtoro de elementa lernolibro, kiu taksas grava la uzon de skeĉoj tre frue en la instruado de la lingvo, estas Vilma Eichholz. En sia ses-parta kurslibro *En novan mondon*[7] estas inkluditaj en la unua kajero plej simplaj skeĉoj por du aŭ tri rolantoj. En la sekvaj kajeroj troviĝas plurscenaj teatraĵetoj por lernejaj teatro-trupetoj. Akompanas la ses tekstokajerojn kasedoj kun la legaĵoj kaj teatraĵoj.

Tiel evidenta estas tiu ĉi rimedo paroligi lingvolernantojn, ke ne estas surprize, ke aŭtoroj de dramaj verkoj atentigas, ke ili verkis simplajn skeĉojn ĝuste por la didaktika celo akceli parolekzercadon. Tiaj publikigaĵoj, kies skeĉoj jam estis sukcese prezentitaj sur scenejoj, estas *Gajaj klubvesperoj* de G. Riisberg[8], *Ni komedietas...* de Zora Heide[9], kaj *Ni aktoras... 3 komedietoj* de Marjorie Boulton[10]. Ne mankas en la bibliografio de teatraj verkoj en E-o pluraj kolektoj de teatra materialo por progresantaj lernantoj. *Teatro en societo*[11] havas 12 originalajn skeĉojn prezentitajn en kunvenoj de la E-Societo "Bude Borjan" en Zagrebo, kaj *Ni ludas teatraĵon* de E.V. Tvarožek[12] kun kvar pli longaj unuaktaĵoj, same servas por ekzerci rolantojn en pli kompetenta lingvouzo. Pli ampleksa kolekto de skeĉoj kaj drametoj estas *Virino ĉe la landlimo* de M. Boulton[13], en kies antaŭparolo la aŭtoro eksplicite apologias pri sia dediĉo al verkado de Esperantaj drametoj. Unue, ŝi celas pliriĉigi la mankhavan ĝenron en E-o; ŝia dua motivo estas pedagogia. Ŝi skribas:

> "Por ellerni la lingvon, oni devas multe legi; kaj por flue paroli, estas pli utile multe laŭtlegi. Dramlegado tre helpas en kursoj, kaj la publika prezentado de dramo estas utila portempa celo. Tial mi verkis ne nur por spertaj e-istoj, kiuj kapablas bone ludi seriozajn dramojn, sed por timemaj gekomencantoj, kiuj povos iom forgesi siajn timojn en simplaj roloj. Ni kutime lernas multon kaj bone fiksas ĝin en la memoro, kiam ni amuziĝas pere de lingvo aŭ alia studotemo.
>
> Mi ankaŭ kredas, ke amatora dramprezentado, eĉ dramlegado, estas terapie tre valora. Dum ni aktoras, ni forgesas nin mem kaj niajn problemojn, ni eksteriĝas ripozige kaj eble ankaŭ stimulas nian imagpovon simpatian. Dramaj ekzercoj ofte helpas nin al malstreĉiĝo kaj tiel al pli bona mensa sano. Ni civilizuloj iom forgesis ludi, kaj ĉiuj homoj bezonas ludon; dramaj aktivoj donas al eĉ la plej laborobsedita konscienco decan pretekston por ludi kaj juniĝi" (pĝ. 7).

Se instruanto intencas utiligi publikigitan materialon, ofte estas necese iom modifi partojn de la teksto laŭ la lingvokapablo de lernantoj. Teatra verko, kiu estas tre facile adaptebla por ĉiuj niveloj de lingvoscio, estas *Amo per proverboj*![14], unuakta komedio, en kies dialogoj estas cititaj multaj lernendaj proverboj. Ĉiu sceno servas

kiel ekzerc-materialo por unu aŭ pli da lecionoj. Ankoraŭ unu populara teksto estas la dramigita versio de *La eta princo* de Antoine de Saint-Exupéry[15]. La redaktoro klarigas, ke la scena versio de tiu mondkonata libro estis verkita por profesia junulara teatro kaj pro tio kelkaj scen-aranĝoj impresas tro komplikaj. Tamen, en lernejaj elementaj kursoj, eblas elekti kaj prezenti kelkajn el la dek tri unuopaj scenoj, en kiuj rolas reĝo, laborema lanternisto, ĉarma vulpino, acida negocisto kaj pluraj aliaj. Vigligo de la kursa laboro estas tre necesa, kaj lerta kursgvidanto kapablas simpligi scenajn kadrojn, tiel ke eblas aranĝi prezentaĵojn en simpla klasa aŭ societa ĉambro.

Notoj

1) Zofia Banet-Fornalowa. *La unua estis brandfaristo.* Esperanto, februaro 1996, pĝ. 22-23.
2) Zofia Banet-Fornalowa. *Esperanto-teatro.* 3 kajeroj.
   1. *Skizo pri Esperanto-teatro*, 36 pĝ.
   2. *Universalaj Kongresoj kaj Esperanto-teatro*, 28 pĝ.
   3. *Polaj aktoroj kaj Esperanto-teatro*, 88 pĝ.
   Düsseldorf: Alfred Conzeth; 1990.
3) Eduard V. Tvarožek. *Teatro por klubvesperoj.* Literatura Foiro, 1995. Unua parto: aprilo, n-ro 154, pĝ. 105-108; dua parto: junio, n-ro 155, pĝ. 159-165.
4) Bertram Potts. Facila skeĉ-albumo. Chapecó: Fonto; 1984, 112 pĝ.
5) Robert Mackay. *Fajro! Fajro!* 1965, 20 pĝ.
   Robert Mackay. *Dek kvin komedietoj.* Glasgow: 1983, 82 pĝ.
6) Jozefo Horváth. *Kelkaj pliaj proponoj por utiligi la Asterikson en la lingvoinstruado.* Pĝ. 75-76 en: *Metodiko en la praktiko*, redaktita de Zs. Barcsay. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio; 1982, 122 pĝ.
7) Vilma S. Eichholz. *En nova mondon.* Rektmetoda kurso por geknaboj. Bailieboro (Kanado): Esperanto Press; 1984, 384+74 pĝ. Ilus. Inkluzive de du po 90-minutaj kasedoj.
8) G. Riisberg. *Gajaj klubvesperoj.* Skeĉoj kaj ludoj. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag; s.d., 32 pĝ.
9) Zora Heide. *Ni komedietas...* Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag; 1971, 32 pĝ.
10) Marjorie Boulton. *Ni aktoras...3 komedietoj.* Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag; 1971, 36 pĝ.
11) *Teatro en societo.* Zagreb: Kroatia Esperanto Servo; 1955, 84 pĝ.
12) Eduard V. Tvarožek. *Ni ludas teatraĵojn.* Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag; 1971, 31 pĝ.
13) Marjorie Boulton. *Virino ĉe la landlimo.* Kopenhago: Eldonejo KOKO; 1959, 196 pĝ.
14) Arthur Azevedo. Amo per proverboj! El la portugala tradukis A. Couto Fernandes. Laroque Timbaut (Francio): Cercle espérantiste de l' Agenais; 1981, 21 pĝ.
15) Antoine de Saint-Exupéry. La eta princo. Kroatigis kaj enscenigis Zvjezdana Ladika. Tradukis el la kroata Emilija Lapenna. Zagreb: Zagreba Esperanto-Ligo; 1990, 36 pĝ.

Bernard Golden, Damjanich u. 1/C. I. 8. HU-8200 Veszprém, Hungario

[Redakcia aldono: *Krom la menciitaj libroj ankaŭ la verkoj de nia kolego Stefan MacGill estas bone uzeblaj kaj plurfoje sukcese prezentitaj.*
Ekzemple: Najbaroj kaj boroj (HEA, 1989), Pordoj (Stafeto, 1984), La laŭta vekhorloĝo (NEJ, 1979), Tridek roluloj (TEJO, 1981).
Ampleksan materialon pri la sama temo ("Instrui per aktorado", "Paroligi per rolludoj") vi trovas en IPR 87/2-3 kaj 88/1.]

* * *

Gabriella Horváth

Analizado de la periodaĵo IPR - 1970-1995 - (Parto II.)

Redaktoroj

La redaktadon de la unuaj numeroj de IPR akceptis Helmut SONNABEND, la tiama vicprezidanto de ILEI. En 1972 en Budapest Reinhard HAUPENTHAL estis petata surpreni la redaktadon. Li transprenis la taskon ekde la Varbnumero (1973). HAUPENTHAL abdikis en 1974, kaj la redak-tadon de la kajeroj 74/3 kaj 75/1 reprenis provizore Helmut SONNABEND. De 75/2 ĝis 76/1 provizore, poste konstante redaktis ĝin Gaston TURIN. (Oni ne povas ekscii, kial abdikis la redaktoroj.) En aŭgusto 1978 la ILEI-estraro decidis, ke IPR havu du redaktorojn. Ekde 79/1 la faka redaktoro estis Helmut SONNABEND, la teknika redaktoro Bruĉjo KASINI, kies tasko estis akcepti kaj aperigi ĉiujn manuskriptojn, kiujn la faka redaktoro subskribis. En la numero 84/3 sur la kovrilpaĝo aperis jena teksto: *"Ekde 1985 IPR deziras novan, ideoj-riĉan, paciencan, energiplenan redaktoron. Li devas multe labori, sed li aŭ ŝi neniam ricevos ian kompenson! Prezentproponojn bonvolu sendi al IPR."* Je la fino de 1985 Helmut SONNABEND efektive ĉesigis sian redaktoran laboron. La numeron 86/1 jam redaktis la nova stabo de IPR: formiĝis redakta komitato el I. BOCIORT; T. CARLEVARO; G. FORMIZZI; K. KIESELMAN; U. LINS; E. LUDWIG; M. MAITZEN; C. MALLIA; Y. MIZUNO, kaj SZERDAHELYI I. fariĝis la redaktisto. La Esperanto-fako en la Universitato Eötvös en Budapeŝto fariĝis la redaktejo. De 87/1 ERTL István transprenis la redaktadon; lin helpis la malnova redakta komitato. Ĝi ŝanĝiĝis ekde 87/2-3: eksiĝis I. BOCIORT kaj E. LUDWIG. La 21-an de aŭgusto 1987 profesoro SZERDAHELYI forpasis; la redakta komitato funkciis kun kvin personoj. Ekde la numero 90/1 la redakta komitato ne estas indikita, verŝajne ĝi ĉesis. La teknikan redaktadon transprenis Stefan MacGILL ekde 90/2. En la teknika redaktado kunhelpis KOVÁCS Márta (ekde 91/2). Ŝi fariĝis redaktisto en 1992 (92/1), la vic-redaktisto estis Stefan MacGILL. La redaktejo funkciis en la domo de KOVÁCS Márta en Budapeŝto. En 1994 (94/4) KOVÁCS Márta ne povis plu redakti la revuon, kaj ankaŭ al Stefan MacGILL estis neebla repreni la redaktadon; nova redaktoro estis serĉata. Provizore

Stefan MacGILL redaktis la numeron 94/4, sed la redaktejo jam translokiĝis al la hejmo de la sekva redaktoro, al NÉMETH József. Kiel vicredaktisto estas elektita SMIDÉLIUSZ Katalin. La redaktista tasko pretendis pli kaj pli da tempo, pro tio leviĝis la deziro, ke la ĉiaman redaktoron helpu redakcia teamo, kies helpo koncernas ĉiam la aktualan numeron, ĝis la revuo ekhavos kompletan redakcion [...]

Eldonistoj

Mi jam menciis, kian malfacilan taskon havis Ludwig PICKEL, la eldonisto de la unuaj numeroj de IPR. Ne estis sufiĉe da abonantoj, kaj je la komenco multe da IPR-numeroj ne aperis. ILEI ĉiam urĝis la eldoniston por la regula apero, sed fine en 1973 ĉiu interrilato estis likvidita kun li rilate al IPR. En julio 1973 ILEI decidis mem eldoni sian organon. La Centra Oficejo de UEA alportis helpon: la organizaĵo surprenis la presadon kaj ekspedadon de IPR. Ekde 79/1 la firmao en Pizo - Edistudio -, kiu kompostis kaj presigis la revuon, transprenis ankaŭ la zorgon de dissendado al la abonantoj.

Ĝis 83/1 eldonis la revuon Edistudio, de post tiu ĉi numero la eldonisto ne estas indikita (ankaŭ en la tiamaj numeroj nenio estis skribita pri tio). En la jaro1986 multaj aferoj ŝanĝiĝis ĉirkaŭ IPR (redaktisto, redakta komitato estiĝis; presado aliloke). De 86/1 la revuo ekhavis novan respondecan eldonanton, Edward SYMOENS, kiu bedaŭrinde mortis je la fino de 1995.

Presejoj

Inter 70/0 kaj 72/1 IPR estis presata en Nürnberg ĉe la Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH. La presadon transprenis la Centra Oficejo de UEA en 1973, la Varbnumero kaj la sekvaj kajeroj ĝis la numero 75/1 pretiĝis en Rotterdam. De 75/2 ĝis 82/3 la presado okazis en Pizo, en Italio ĉe Offset Vallerini. Sed la redaktoro estis nekontenta, ĉar multe da eraroj falis en la presadon, kaj la korektado malfruigis la aperadon de IPR. Helmut SONNABEND serĉis alian presejon en Italio (Offset Massarosa) ekde 1983. La Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio en Antwerpen faris la presadon inter la numeroj 86/1 kaj 87/2-3. Ekde 1988 ĝis nun por la presado estas respondeca la Flandra Esperanto-Ligo, Grafika Centro Antverpeno.

La strukturo de la revuo

La ekstera formo de la revuo multfoje ŝanĝiĝis: la unuaj kajeroj aperis en formato B/5 formo, de la Varbnumero en A/5. La titolpaĝo kaj la litertipoj dum la jaroj moderniĝis, la ilustraĵoj de la pli novaj jarkolektoj igas la gazeton tre vigla.

Sed estas multe pli grava la interna strukturo, la enhava konstruo, kiu respegulas la imagojn de la redaktoroj kaj la pretendojn de la legantoj. La revuo iĝis pli kaj pli abunda, laŭ la proponoj kaj deziroj de la legantoj (ekz. 93/ *Varbnumero* p. 4.; 85/1 p.

2.): estiĝis novaj rubrikoj, oni ricevis pli multe da informoj pri aranĝoj, aliaj eventoj, kontakt-eblecoj ktp.

Ni vidu la internan strukturon pli detale! Helmut SONNABEND proponis konstantan strukturon en la *Provnumero* en 1970:

a) Teoriaj artikoloj el la pedagogia scienco
b) Fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj
c) Informoj el la pedagogia vivo
d) Opinio - propono - deziro - sciigo

Ĉi tiun skemon sekvis la numeroj ĝis 1972. La kvar rubrikojn kompletigis la rubrikoj "*Dokumentoj*" (kiel Esperanto estas instruata en la lernejoj; en 70/1), "*Alvokoj*" (71/2), "*Forumo*" (forumo de la kontaktoj, leteroj, priparolendaĵoj; en 71/1). La divido de ĝeneralaj pedagogiaj kaj fakmetodaj artikoloj ĉesis ekde 72/1. La *Varbnumero* portis novan strukturon, laŭ kiu estis redaktataj tri numeroj :

a) Artikoloj
b) Recenzoj
c) Ni ricevis (pri aperintaj libroj)
d) Niaj legantoj opinias

Ankaŭ la strukturo kaj temaro de la kajero 74/3 montras la malfacilaĵojn de la transiro (la malnova redaktoro abdikis, la provizora redaktisto ne ricevis sufiĉe da artikoloj): tiu ĉi numero temas pri ILEI-aferoj, konferencoj kaj entenas unu artikolon de Helmut SONNABEND. Inter 75/1 kaj 85/3 IPR konstruiĝis sen konstantaj rubrikoj. Komence apud teoriaj artikoloj aperis informoj pri kelkaj aranĝoj (fakte nur kelkaj), ILEI-konferencoj; ekstrema okazo, kiam la revuo konsistis el kvazaŭ nur raportoj pri diversaj aranĝoj aŭ organizaĵoj (80/3; 85/1). Laŭ mia opinio en multaj numeroj la redaktoro ne estis konsekvenca koncerne la strukturon. Okazis, ke la teoriaj pedagogiaj artikoloj sekvis ILEI-aferojn, reagojn (79/2; 80/1), aŭ ili miksiĝis kun alitemaj artikoloj (83/3; 84/1; 84/3; 85/3).

En la skribaĵo de Hans FECHLER: *Letero al la redaktoro* (85/1 p. 2-4.) la aŭtoro resumis siajn imagojn pri iu multe pli abunda pedagogia revuo. Li proponis multajn novajn rubrikojn, per kiuj la revuo povus ebligi, faciligi la estontajn personajn kontaktojn, kaj li proponis publikigi artikolojn pri mankantaj temoj. Ŝajnas al mi, ke la redaktoroj de la sekvantaj numeroj atentis pri la proponoj de FECHLER, ja estiĝis diversaj konstantaj rubrikoj (*Librobreto, El la vivo de Sekcioj, Aktualaĵoj, Anoncoj, Recenzoj, Leterkesto, ILEI-labortable*), kiuj ne aperis en ĉiu numero, sed de tempo al tempo ili denove revenis. En la plej lastaj numeroj startis novaj rubrikoj: "*El niaj metioj*" (95/3), en kiu instruistoj raportas pri lernejaj rezultoj, instrumetodoj, kaj donas konsilojn por gekolegoj. Mi konsideras tre utila la rubrikon "Tasko-folio" (95/3), kiu entenas ekzercojn kopieblajn.

La rubriko *"El la landoj kaj sekcioj"* iomete ŝanĝiĝis dum la redaktado de NÉMETH József. Apud la raportoj pri la vivo kaj funkciado de la sekcioj, ĝi

kompletiĝis kun alvokoj pri diversaj aranĝoj, kursoj. Mi povas konstati, ke ekde 1986 la revuo enhavas pli multe da informoj, kolektitaj el diversaj revuoj, sekcioj.

Sekve ankaŭ la amplekso de la revuo kreskis. Komence la paĝnombro dependis de la materialo (24-28 paĝoj), poste ĝis 1986 la revuo havis 24 paĝojn (escepte la jarkolektojn 1981 kaj 1985, tiam ĝi estis pli ampleksa). Post mallonga ŝanceliĝo de la paĝnombro IPR aperis kun 36 aŭ 40 paĝoj ekde 1989, kaj nuntempe konstatante kun 36 paĝoj.

Celaro por IPR

Granda pretendo de esperantistaj instruistoj revivigis la revuon. Ĝis la numero 94/4 la redaktistoj laboris sen iu ajn skribita celaro, sed iliaj imagoj ĉiam respegulis la plej gravajn planojn de ILEI koncerne IPR. Pri ĝia celo Helmut SONNABEND, la unua redaktoro tiel konceptis: IPR fariĝu pedagogia forumo, per kies helpo la instruistoj povas diskuti pri pedagogiaj kaj didaktikaj problemoj (70/0 p. 4.). Laŭ RAKUŜA - en la malferma artikolo en 70/0 - la bona faka revuo per altnivelaj metodikaj kontribuaĵoj, per publikigo de provlecionoj, per la gvidiloj de eksterlernejaj aktivecoj ktp. nepre pliigus la fortojn, instigojn kaj memfidon de la instruistoj, izolitaj de aliaj gekolegoj.

Ĉiu redaktoro havis propran ideon pri la celoj de la revuo. Laŭ HAUPENTHAL (73/Varb. p. 3.) IPR havas duoblan funkcion: unuflanke la aŭtora kaj legantara internacieco garantiu la progresivon de la ĝenerale pedagogia revuo, aliflanke ĝi fariĝu faka organo per didaktikaj kaj metodikaj artikoloj. Kiel pedagogia gazeto ĝi devas funkcii ankaŭ kiel refera organo, kiu sciigas pri novaj pedagogiaj, metodikaj kaj alitemaj libroj, pri diversaj aranĝoj koncerne la Esperanto-instruadon. Inter liaj konceptoj estis, ke en IPR oni povus publikigi didaktikajn tipologiojn de diversaj instruobjektoj (sed ĝis nun tio ne efektiviĝis).

Dum la konferenco en Maribor estis priparolata kaj akceptata, ke oni klopodu kontribui al la revuo laŭeble originalajn studojn, kiuj poste povus aperi en nacilingvaj gazetoj aŭ ankaŭ en diversaj esperantlingvaj, nepedagogiaj revuoj. (Multfoje tio okazis ĝuste inverse.) Estas tasko de la ĉiama redaktoro, ke li aŭ ŝi trovu la ekvilibron inter la ĝenerale pedagogiaj kaj la Esperanto-instruaj artikoloj kaj inter teoriaj kaj praktikaj kontribuaĵoj.

En 1986 SZERDAHELYI István fariĝis la redaktisto. Li - malĝojinte pro la malpliiĝo de la membraro de ILEI - decidis, ke li kunordigos la laboron de la Esperanto-instruistoj per la helpo de la revuo. Post lia morto en la numero 88/1 la nova redaktisto, ERTL István petis la legantaron voĉdoni pri la revuo per enketilo, por ke ĝi estu pli varia, kaj enhavu tiujn rubrikojn, kiujn la plimulto de la legantoj juĝas gravaj. Li ne informis rekte pri la rezulto de la enketo, sed la revuo kompletiĝis kun novaj rubrikoj (vidu poste). Kiam KOVÁCS Márta transprenis la redaktadon (1992), ŝi akcentis tre gravajn - sed ne novajn - vidpunktojn el la celaro de IPR: la ekvilibron

inter praktikaj kaj teoriaj artikoloj kaj organizaj informoj; la gravecon de konstantaj rubrikoj. Jam longtempe ne aperis kontribuaĵoj pri aliaj studobjektoj, pro tio ŝi konsideris grava tasko, ke denove estu publikigotaj artikoloj pri diversaj instruobjektoj - efektive la revuo celas ne nur Esperanto-instruistojn, sed instruistojn, kiuj uzas Esperanton. Bedaŭrinde nur du artikoloj aperis pri aliaj studobjektoj (en 92/3 kaj 93/3) kaj sep kontribuaĵoj publikiĝis pri neesperanta temo, precipe pri lingvistiko kaj sociologio. Sed mi devas aldoni, ke ne nur de la redaktoro dependas, kion li publikigas: se li ne ricevas konvenajn kontribuaĵojn, li ne povas ĉiam efektivigi siajn imagojn.

La nuna redaktoro, NÉMETH József pensas (95/1 p.36.), ke la praktikaj artikoloj kaj aferoj estas pli gravaj ol la teoriaj. Li volas igi la revuon pli praktika kaj varia. Por dokumenti la pedagogian laboron de ILEI kolektive kaj de ĝiaj anoj individue, por igi la informadon pli plena kaj preciza, li transprenas kontribuaĵojn el aliaj revuoj. Tiun ĉi solvon multaj riproĉis, sed mi pensas, ke por unu homo estas tro granda tasko informiĝi pri ĉiuj aranĝoj, alvokoj ktp. Ĉi tiu tasko pretendus multajn kunlaborantojn. Mi opinias, ke ĉiuj organizaĵoj kaj homoj, kiuj organizas programojn, aranĝojn aŭ kiuj raportas pri pedagogiaj aferoj, devus informi pri ili la redakcion de IPR. Tiam la redaktoro ne devus publikigi informojn el aliaj gazetoj, kaj la revuo - legata en la plej granda rondo de esperantistaj instruistoj - fariĝus tre utila organo koncerne ankaŭ informadon.

[NdlR - eble ankaŭ vi mem povis sperti, ke dumtempe la proporcio de transprenitaj artikoloj signife malkreskis]

La celaro de IPR estas aperigita en la lasta numero de 1994. Mi ne volas detale raporti pri tio, ja ĉiu povas legi ĝin; mi nur resumas, por ke la skizo pri la historio de IPR estu plena. La celoj de la revuo estas:

1) aperigi fakajn artikolojn pri metodikaj problemoj, pri la efika lingvo- instruado (ne nur pri Esperanto)
2) doni praktikan didaktikan helpilon, uzeblan dum la lecionoj aŭ dum la preparo de la instruistoj; recenzojn kaj listojn pri lerniloj kaj instruhelpiloj
3) servi la membraron per informoj pri aranĝoj, enketoj, adreso-listoj; raporti pri la agado de la sekcioj, internaciaj kontaktoj, financaj aferoj de ILEI, pri la UEA/ ILEI-ekzamenoj
4) stimuli informo-fluon inter E-instruistoj kaj la "pedagogia mondo" (informoj pri Esperanto, enhav-resumoj por aliaj nacilingvaj gazetoj).

Videblas, ke jam Rudolf RAKUŠA vortumis la plej gravajn taskojn de la revuo en la Varbnumero en 1973.

(Daŭrigota)

Li Weilun

Kiel klarigi vortojn

Por posedi lingvon oni devas lerni vortojn. En lingva instruado klarigi vortojn estas unu el la gravaj taskoj. Jen kelkaj metodoj:

1. Intuicia Metodo

Tiu ĉi metodo estas vaste uzata en elementa kurso, precipe por komencantoj, ĉar ili konas nur malmultajn vortojn kaj multaj fundamentaj vortoj estas klarigeblaj per ĝi.

1.1 Per objekto

Tiu ĉi metodo estas uzata ĉefe por klarigi konkretajn substantivojn. Instruisto povas utiligi objektojn troviĝantajn en la klasĉambro kaj alporti aliajn objektojn.

1.2 Per bildo

Iuj objektoj estas tro grandaj kaj pezaj. Oni ne povas alporti ilin al la klasĉambro. En tiu ĉi okazo instruisto devas prepari bildojn aŭ desegni ilin sur la nigra tabulo. Por tio utilas, se la instruisto scipovas desegni.

1.3 Per signo

Ekzemple, por klarigi la vortojn esprimantajn interpunkcion, oni povas uzi interpunkciajn signojn. Ankaŭ arabaj ciferoj estas signoj. Ili povas esti uzataj por instrui bazajn numeralojn.

1.4 Per ago

Tiu ĉi formo estas uzata ĉefe por klarigi verbojn. Ekzemple, por klarigi la vorton *salti* la instruisto povas salti.

1.5 Per gesto

Por klarigi la vorton *alta*, oni povas levi la manon super la kapon.

1.6 Per mieno

Tiu ĉi teknikero estas uzata ĉefe por klarigi la vortojn esprimantajn senton. Ekzemple, por klarigi la vorton *koleri*, instruisto faras mienon de kolero. Pro tio instruisto devas esti "aktoro".

1.7 Per sono

Ekzemple, por klarigi la vorton *kokeriko*, oni povas kokeriki; por klarigi la verbon *tusi*, oni povas tusi.

1.8 Per situacio

Ekzemple, se iu lernanto ne ĉeestas, la instruisto povas diri, ke li forestas, por klarigi la vorton *foresti*; se iu lernanto estas mal-sana, instruisto povas diri tion por instrui la adjektivon *malsana*.

2. Eksplika Metodo

Tiu ĉi metodo klarigas fremdlingvajn vortojn per la sama lingvo. Ĝi estas uzata ĉefe en mezgrada kaj progresiga kursoj. Oni devas sekvi la principon: klarigi novan vorton per lernitaj vortoj.

2.1 Per eksplikaj vortoj

siesto: mallonga dormo post tagmanĝo
adreso: loĝloko de persono
avo: patro de patro aŭ patrino
fidi: plenkredi pri iu aŭ io
frosti: esti tre malvarma
hejti: varmigi ĉambron aŭ loĝejon
furioza: freneze kolera
surda: nepovanta aŭdi
lerta: tre kapabla facile fari ion

2.2 Per sinonimo

ekspliki: klarigi
mediti: pripensadi
urĝi: plirapidigi
turisto: vojaĝanto
ferio: libertempo
teruro: timego
efektiva: reala
moderna: nuntempa

2.3 Per antonimo

morti ⇔ vivi
fini ⇔ komenci
detrui ⇔ konstrui
pesimismo ⇔ optimismo
opono ⇔ konsento
interna ⇔ ekstera
pasiva ⇔ aktiva
absoluta ⇔ relativa
rifuzi ⇔ akcepti

2.4 Per figura esprimo

kamelo: besto nomata "ŝipo en dezerto"
pego: birdo nomata "kuracisto en arbaro"
tigro: reĝo de la bestoj
biero: likva pano

3. Perekzempla metodo

Tiu ĉi metodo utiligas la sciojn de la lernantoj por klarigi vortojn.
Ekzemple, por klarigi la vorton *ĉefurbo*, instruisto povas doni jenajn ekzemplojn:
Pekino estas la ĉefurbo de Ĉinio.
Tokio estas la ĉefurbo de Japanio.
Parizo estas la ĉefurbo de Francio.
Londono estas la ĉefurbo de Anglio.

Por klarigi la vorton *meblo* oni povas diri: *Tablo estas meblo. Ankaŭ seĝo estas meblo...*

4. Perkunteksta Metodo

Ĉi tiu metodo utiligas kuntekston por la klarigado.
Ekzemple, por klarigi la vorton *emeritiĝi*, oni povas diri:
Mia patro havas 63 jarojn. Nun li ne laboras. Antaŭ tri jaroj li jam emeritiĝis.

5. Paŝo-post-paŝo-Metodo

Por klarigi la vorton *ellitiĝi*, oni devas unue klarigi la vorton *lito* per bildo, kaj poste la prefikson *el* per signo.

6. Traduka Metodo

Iuj abstraktaj vortoj estas malfacile klarigeblaj per E-o. En tiu ĉi okazo la sola metodo estas traduki ilin en la nacian lingvon de la lernantoj.

7. Kompara Metodo

Se lernantoj konas alian fremdan lingvon, oni povas kompari tiun lingvon kaj E-on en klarigado de vortoj. Efektive ankaŭ tiu ĉi metodo estas traduka metodo: traduki Esperantan vorton en alian fremdan lingvon. Ekzemple: *kun - with, hejmo - home, facila - easy, rigardi - look*.

Ni strebu kiel eble plej multe uzi E-on por instrui E-on, kaj kiel eble plej malmulte uzi - sed ne ekskluzivi - la nacian lingvon.

***Li Weilun**, Pekina Lingva Instituto, Ĉinio*

Ni testu niajn testojn

Instruisto ofte celas rapide prijuĝi la konojn de siaj lernantoj, malkaŝi tiujn punktojn, kie li/ŝi devas kompletigi la instruadon. Estas multaj tipoj de tiaj mezuriloj. Unu, sufiĉe populara estas la gramatika testo, kiu havas multajn tipojn.
Inter la recenzoj vi povas legi informojn pri testolibro, verkita kaj eldonita de hungaroj. Trafoliumante la materialon mi havis la ideon lanĉi malgrandan kurson pri testo-prilaborado kaj ties kaptiloj, efikoj, utileco, ktp.
Por enkonduki la temon - al kiu mi atendas viajn kontribuaĵojn - mi elektis el la menciita libro 30 testodemandojn, el kiuj 10 povas esti utiligeblaj en E-o kursoj kaj la alia dekopo estas tia, kies eroj laŭ mia prijuĝo ne estas taŭgaj por tiu ĉi celo.
Antaŭ ol legi ilin, sciu, ke krei teston ne estas facila tasko. La testataj dum la ekzameno ofte trovas plurajn bonajn aŭ almenaŭ akcepteblajn solvojn, pri kiuj la kompilinto tute ne pensis. Se ne tio, do aliaj kaptiloj malfaciligas la sukceson: tajperaroj, influo de la nacia lingvo, enhave sensencaj aŭ ne praktikaj frazoj, ripetiĝoj, ktp.
Sub la punkto *B* la testodemandoj havas iom da difektoj. Fariĝu ili tasko por niaj legantoj! Trovu kial mi opinias ilin neutilaj, pliprecizigendaj!

A - Proveblaj

1) Paŭlo ..... pilkludojn al muziko.
A: plue ŝatas B: plie amas C: preferas Ĉ: malamas

2) ..... kiam vi lernas Esperanton?
A: Ĉe B: Antaŭ C: Ekde Ĉ: Ankaŭ

3) Maria ricevis donace arĝentan manĝ.....
A: -ejon B: -ilajn C: -ilaron Ĉ: -ingon

4) Li venas ..... la stacidomo.
A: da B: por C: el Ĉ: ek

5) Petro malfruis ..... la pluvo.
A: pro B: por C: de Ĉ: pri

6) La pomoj kreskas sur la .....
A: pomfolio B: pomarbo C: pomligno Ĉ: pomejo

7) Kie trov..... la monujo?
A: -as B: -iĝas C: -os Ĉ: -is

8) Vi povas aĉeti .... vi havos monon.
A: kion, por tion B: tiom, por kiom
C: kian, por tian Ĉ: tian, por kien

9) La mono troviĝas ..... la monujo.
A: preter B: en C: al Ĉ: el

10) Via helpemo estas .....
A: dankinda B: dankema C: dankinta Ĉ: dankonta
11) ..... la Tero ne ekzistas vivo.
A: Krom B: Ekster C: Preter Ĉ: Nur
12) ..... la parko apartenas fontano.
A: Al B: Por C: Ĝis Ĉ: El
13) La murdisto estas .....
A: aĉuloj B: filulo C: fiaĉo Ĉ: krimulo
14) Kiam mi hejmenvenis, mia kunulo ĝuste tiam estis ..... la leteron.
A: skribata B: skribota C: skribanta Ĉ: skribenda
15) La naĝejo estis plena ..... genaĝantoj.
A: kun B: per C: de Ĉ: da
16) Ni batalos per ĉiuj rimedoj ..... la akuzoj de niaj malamikoj.
A: malantaŭ B: kontraŭ C: krom Ĉ: inter
17) Mi promenas ..... mia plej bona amiko.
A: per B: kun C: for Ĉ: krom
18) Kiam mi vekiĝas, la sonorilo estas .....
A: sonanta B: sonita C: soniga Ĉ: sonota
19) La fratino de mia edzo estas mia .....
A: bogeavo B: bofratino C: bofilino Ĉ: bonepino
20) ..... unu semajno jam estos printempo.
A: Post B: Ekpost C: Depost Ĉ: Poste

B - Korektendaj

1) Anna petis, ke ĵaŭde mi ne ..... ŝin.
A: veki B: ne vekiĝu C: ĝenu Ĉ: ne vekos
2) Kiu ne laboras, restas ..... monoj.
A: mal B: sen C: kun Ĉ: per
3) La hungara parlamentejo estis ..... fine de la XIX-a jarcento.
A: konstruanta B: konstruiata C: konstruinta Ĉ: konstruota
4) La studjaro komenciĝas ..... de septembro.
A: je la unua B: je la unuan C: la unuan Ĉ: unuan
5) Ni est... forir....aj, se vi ĝustatempe est... reven.....
A: -inta, -us B: -us, -ata C: -us, -ota Ĉ: -us, -inta
6) ..... alvenos la rapidtrajno?
A: Je kiam B: Kiam C: Kioman horon Ĉ: Kiome
7) Oni ne povas aĉeti ..... mono.
A: pri B: dum C: sen Ĉ: pro
8) Eva parolas ..... Karlo.
A: post B: kun C: per Ĉ: for

9) Bedaŭrinde ..... mi ne havas paperon, tiel mi ne povas skribi.
A: nenioB: ne C: nun Ĉ: nur
10) Okaze ..... deka datreveno, la aŭtomobilo jam difektiĝis.
A: da la B: de la C: pro la Ĉ: pri la

*dr. **Katalin Smidéliusz**, metodikisto*
HU-9700 Szombathely, Kós Károly u. 29.
Tel. +36-94-320313. Retadreso: smidik@rik.bdtf.hu

Landoj kaj sekcioj

Argentino

De la 9-a ĝis la 12-a de oktobro 1997 okazos la 4-a Interlanda Konferenco pri Instruado en urbo Buenos Aires (Argentino). Pliaj informoj ĉe Argentina Esperanto-Ligo, Paraguay 2357, Dto. 2, AR-1121 Buenos Aires, Argentino.

Aŭstralio

Konferenco de ILEI - kompletigoj kaj korektoj

1) La vojaĝkostoj de Adelajdo al Melburno estas nur por iro, ne por iro kaj reveno.

[NdlR - unu el niaj redakcianoj havis tiun informon, ke la menciitaj sumoj estas por ir-revena bileto. Post la ricevo de la supra informo de Atilio mi retmesaĝis al Jennifer Bishop, kiu pravigis lian opinion. Tamen ŝi aldonis, ke intertempe ŝi trovis pli malmultekostan eblecon, sed oni devas scii, ke ankaŭ la surloka veturado kostas iom. Kvankam ŝi esperas havi rabatojn por grupoj de pli ol 10 personoj. Ĉiuj, kiuj volas havi la aktualajn prezojn kaj teknikajn detalojn, turnu sin rekte al ŝi. Retadreso: esperanto@education.monash.edu.au. Poŝtadreso: 39 Hill Street, Hawthorn Victoria 3122 Aŭstralio].

2) La temo de la Konferenco: "**Multkultureco kaj lingvolernado.**"

3) Kadre de la Konferenco en Lara (tio estas la nomo de la loko!) ne okazos la tradicia ILEI-Gimnazio.
4) Marde ni havos tuttagan ekskurson *(kosto 35 NLG)* al urbo Melburno, la impona havenurbo de Aŭstralio, ĉefurbo de ŝtato Viktorio kun proksimume 3.000.000 da loĝantoj. Tiam ni vizitos ankaŭ la Universitaton Monash por konatiĝi surloke kun la Departemento pri Esperanto kaj la funkcianta projekto EKPAROLI. Vendrede ni vizitos la marbordon *(kosto: 50 NLG)*. La ekskurso inkluzivas viziton al la Nacia Lanmuzeo en urbo Geelongo; trarigardon al la famaj surfplaĝoj de la regiono;

eniron en la golfejon de Anglesey por vidi la famajn aŭstraliajn kanguruojn; promenadon en la Nacia Parko en Otways por konatiĝi kun la mirindaj akvofaloj kaj naturaj belaĵoj kaj ni certigas al vi spektaklan veturadon laŭ la superba oceanvojo, kiu permesos al ni foti la naturon laŭplaĉe.

Mag. Atilio Orellana Rojas

Ĉinio

Seminario pri kulturo kaj instruado de Esperanto

Wuhan, 17-21 aŭgusto 1996

La Seminario okazis en Donghu Esperanto-Domo (DED) kun la partopreno de 22 esperantistoj, en la nova sidejo de Hubei Esperanto-Asocio (HEA), ĉe la bordo de la Orienta Lago. La partoprenantoj pasigis 3 tagojn en DED kaj 3 tagojn surŝipe.

La fondon de DED iniciatis s-roj Peng Zhengming kaj Zhang Danchen en decembro 1994. Ĝi malfermiĝis la 30-an de junio 1996 tiel, ke Peng Zhengming oferis parton de sia propra domo, kiu havas la funkciojn de muzeo, biblioteko, publika aktivejo kaj sidejo de HEA.

Dum la Seminario okazis 12 prelegoj pri literaturo, E-Radio, komputado, movado kaj ankaŭ pri pedagogio. Interalie tiuj de Zhang Danchen, estrarano de ILEI: "Rolo de E-instruado en la E-movado"; Lu Jizin: "Faciligo de vortlernado per rimversaĵoj" kaj Huang Zisheng: "E-instruado ekster lernejoj".

Laŭ informoj de Komunikilo de ILEI - Ĉina Sekcio de ILEI, oktobro 1996

Esperanto-kurso en Guozhuangzi-mezlernejo de Tianjin

En Guozhuangzi-mezlernejo de Tianjin funkcias E-kurso, kiun gvidas s-ino *Liu Jun*, kun helpo kaj subteno de la lerneja direktoro, Tianjin-a E-Asocio kaj ĉina sekcio de ILEI. La kurso, kiel eduk-eksperimentejo en la urbo, estas atentita de Tianjin-a Eduk-Akademio kaj rilataj organizoj.

Nun, *[dec.1996 - NdlR]* post du monatoj, la 25 kursanoj povas kanti kaj fari simplan konversacion en E-o. Germana e-istino, *Natalie Schuchert*, kiu lernas en Tianjin, ofte vizitas la kurson por ekzerci la gelernantojn en parolado kaj amikiĝi kun ili. Ili deziras kontakti aliajn junajn geamikojn en diversaj landoj. Jen ilia adreso:

Liu Jun, Guo Zhuang Zi Zhong Xue, He Dong Qu, 300011 Tianjin

Informis: ***Han Zuwu***, *fakdelegito de UEA pri instruado, Wan Xin Cun 5 Qu, 21 Lou 1 Men 501, He Dong Qu, Tianjin 300612 Ĉinio*

Hungario

12-aj Pedagogiaj Tagoj kaj 5-a SOJLO (Semajnfino de Junaj Lernemuloj)

1-2-a de marto 1997 Budapeŝto

Loko (konferencejo, tranoktado, manĝoj): Vakok és Gyengénlátók Általános Iskolája és Nevelőotthona, HU-1146 Budapest, Ajtósi Dürer sor 39.

Alveno: inter la 9-a kaj 10-a horoj sabate. Fino: dimanĉe, post tagmanĝo.

El la programo: Pedagogiaj utopioj (Rados Péter András), Kiel varbi por kurso? (Sárközi János), Rilato de lingvo kaj persono (dr. Wacha Balázs).

Por gelernantoj 10-18-jaraj: aparta programo kun du lecionoj antaŭtagmeze kaj unu posttagmeze, (pri lingvo, literaturo, muziko, matematiko, manlaboro k.s.) + abundaj komunaj aktivecaj kulturaj, distraj...

Se vi intencas partopreni la konferencon, anoncu vin ĉe József Németh ĝis la 15-a de februaro 1997. *(Adreso kovrilpaĝe.)*

Esperantologia Konferenco en Budapeŝto

La Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de la Filologia Fakultato de Universitato Eötvös Loránd (ELTE) organizos sciencan konferencon en Budapeŝto la 17-an kaj 18-an de aprilo 1997, en la Konferencejo de la Fakultato (Budapest, V. Piarista köz 1. 1-a etaĝo), okaze kaj feste de la 30-a datreveno de fondiĝo de la universitata Esperanto-fako.

La E-fako funkcias enkadre de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko. Dum la pasintaj jaroj ĝia populareco signife grandiĝis. El la kunlaboro de la fakoj pri ĝenerala lingvistiko kaj pri Esperanto povas rezulti, ke E-fako fariĝos altnivela, scienca kaj pretendema universitata fako. Por atingi tion en la aŭtuna semestro de la studjaro 1996-97 oni realigis gravan reformon en la kursaro de la E-fako. Sekve de la speciala statuso de E-o kiel planita lingvo, de nun la gestudentoj povos kompletigi siajn studojn per ĝisfunda formado pri ĝenerala lingvistiko.

La celo estas krei mondan centron pri esperantologio en tiu katedro, tian, kiu povas esti la plej altnivela instrua bazo de la hungaraj kaj la eksterlandaj esperantistoj. Oni planas ebligi al la diplomitaj gestudentoj ankaŭ la partoprenon en la katedra programo celanta formi doktorojn pri filologio (phD).

La organizantoj esperas, ke la festa scienca konferenco grandmezure fortikigos la poziciojn de E-o ne nur en Hungario, sed ankaŭ en la tuta mondo.

La organizantoj de la konferenco mendis rabatajn ĉambrojn en la hotelnivela gastejo de la Universitato (40 DEM por unu tago). Adreso: Hotel Peregrinus, HU-1053Budapest, V., Szerb u. 3. Tel: +36-1-266-4911, +36-1-266-4913.

Adreso de la organizantoj: Esperanto-fako de Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko, HU-1052 Budapest, V., Piarista köz 1. Tel: +36-1-267-0966/51-85 aŭ +36-1-266-9100/51-85. Faksilo: +36-1-266-5699.

Informis: ***d-ro Tamás Gecső****, katedrestro*

Kroatio

Mazi ekloĝis en Kroatio

Video-kurso *Mazi en Gondolando* estas tre vaste uzata kaj prezentata en Kroatio. Dum la Ago-tago en plej granda zagreba magazeno NAMA i.a. eldonaĵoj la vizitantoj povis foliumi novan aktivigan libron kaj sperti video-kurson. Kroata Esperanto Unuiĝo (KEU) ankaŭ la aŭtunan seminarion dediĉis al Mazi. La kursanoj partoprenis

laborgrupon kaj sprite prilaboris interesajn Mazi-taskfoliojn. Dum la lernojaro oni fondos Mazi-studgrupojn en kelkaj urboj. Ĉefa organizanto estas Landa Sekcio de ILEI.

Internacia infan-ekspozicio

KEU organizis internacian ekspozicion "Mia novjara mesaĝo". Iom malpli ol 400 desegnaĵojn verkis infanoj en la aĝo de 4 ĝis 15 jaroj el Albanio, Aŭstralio, Belgio, Britio, Francio, Hispanio, Hungario, Finnlando, Italio, Kroatio, Niĝerio, Rumanio, Rusio, Slovenio, Usono. Menciindas, ke kelkaj ILEI-anoj helpis la konkurson, i.a. J. Bishop, R. Glossop, I. Gonĉarova, G. Kurucz, B. Mezini kaj M. Noël. Pri la ekspozicio vaste informis naciaj komunikiloj: radio kaj gazetaro.

KEU tuj informas pri nova konkurso: okaze de Alp-Adria konferenco, kiu ĉi-jare okazos komence de junio en Kroatio, KEU organizas literaturan, desegno- kaj fotokonkursojn sub la komuna temo "Naturo - nia vivmedio.

Pli da informoj oni povas ricevi ĉe:

prof. Ivan Bekavac-Basiĉ, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio

Litovio

Elementa kurso en Marijampolé

La unuan fojon E-klubo *Alfabeto* en *Marijampolé* organizis elementan kurson laŭ Cseh-metodo por geinstruistoj de diversaj fakoj. La kurson gvidis tre konata Cseh-instruistino Ewa Bondar el Pollando. Dum 32 horoj ŝi konatigis la geinstruistojn kun E-o kaj kun la Cseh-metodo. La kurson finis 17 aŭskultantoj. Krome 4 instruistinoj vizitis apartan seminarion *A* kaj ricevis IEI atestilojn de grado *A*.

*Laŭ informoj de **Danuté Vidrinskiené** el Litova Stelo 4/96*

Rumanio

En la nuna lernojaro la E-agado - kompare kun la pasintaj jaroj - vigliĝis. En septembro la rumana televido "Europa Nova" organizis 75-minutan intervjuon pri E-o en la horo de granda aŭskultateco. Surbaze de ĉ. 30 demandoj prof. Ignat Florian Bociort, honora prezidanto de Rumana Esperanto Asocio (REA), inĝ. Dorin Hehn, prezidanto de REA kaj prof-ino Florica Popa, ĝenerala sekretario de REA kaj sekciestro de ILEI klarigis plurajn aspektojn de la Esperanto ideo kaj E-movado. La gvidantaro de la televido "Europa Nova" decidis tuj organizi E-telekursojn, kiujn ni ĝis nun ne sukcesis komenci pro manko de E-materialoj. [...] En la komenco de oktobro 1996 ĉ. 15 personoj komencis lerni kun sinjoro Dorin Hehn. Krome en nia urbo - kaj ankaŭ en aliaj urboj - malfermiĝis kursoj en lernejo. Laŭ mia opinio intereso por E-o kreskas de tago al tago. Proksimume 150 personoj lernas E-on nun en Brasovo, Oradea, Baia Mare, Cluj, Craiova ktp. ILEI nun havas 12 anojn. [...]

Prof. Popa Florica,
Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara Svislando

Svedio

Informo de la Esperanto-fako en Karlskoga.

Ekde 1988 ni jam havis 36 diversajn nacianojn en nia E-fako. En la nuna komencanta kurso estas studantoj el 7 nacioj - Ĉinio, Japanio, Hindio, Islando, Norvegio, Albanio kaj Svedio. Oni havas 22 lecionojn enklase ĉiun semajnon inkl. kelkajn en la lingvo-laboratorio. La instruado estas en E-o kaj jam post 2-3 semajnoj la komencantoj faras etajn prelegojn kaj skribas eseetojn.[...]

En nia kurso estas Zhang Qian Yuan, fama kaj talentega pentristo. Mi renkontis lin dum la Esperanta Monda Kongreso en Tampereo lastsomere kaj post multe da invitleteroj li sukcesis havigi al si vizon. Nun li havas ekspozicion en la urba biblioteko kaj en nia Popola Altlernejo. Inter la belaj pentraĵoj estas unu 8-metra pri la terakotaj soldatoj de la Ĉin-dinastio. Mi vere rekomendas al la kluboj inviti Qian Yuan por prezenti siajn artaĵojn. Jam tri ĵurnaloj skribis grandajn artikolojn pri li kaj nia regiona TV- stacio faris triminutan programon pri lia pentrado kaj eĉ montris kiam li instruis Tai-ĉi.

Al la somera kurso en junio venis profesia filmteamo por fari videofilmon pri E-o en Karlskoga Popola Altlernejo. Ĝi supozeble estos bona ankaŭ por reklama uzado, ne nur por la E-fako de nia lernejo sed ankaŭ por kluboj, renkontiĝoj, gimnazioj, kursoj ktp. La Sveda Ŝtata Edukradio faris kvin programojn pri la Internacia Lingvo Esperanto. La kvin dudek-minutaj programoj, verkitaj en nia lernejo, enhavas informojn pri la lingvo kaj la ideo, historio, intervjuoj, organizo, kantado, renkontiĝoj kaj kongresoj, gazetoj, literaturo kaj aliaj interesaĵoj. [...] Se la orientiga programo, kiun oni intencas sendi plurfoje, vekos intereson oni verŝajne volas fari radiokurson pri E-o.

Kiel vi verŝajne scias, esperantistoj en Svedio planas aĉeti kursejon en Lesjöfors, 80 kilometrojn norde de Karlskoga. Estraro jam estas elektita, mebloj jam aĉetitaj kaj nun ni atendas oficialan jeson de la komunumo de Lesjöfors. Se ĉio bone realiĝos, la someraj kursoj verŝajne estos lokitaj tie en 1997. Ni povas prepari vin por grandaj, internaciaj someraj kursoj, kie gejunuloj povos malmultigi la kostojn tendumante aŭ amasloĝante. Mi vere bonvenigas la laboron por tiu kursejo, ĉar ĝi certe povas doni multe da kursanoj al la E-fako en Karlskoga. Mi faros mian plejeblon por apogi la realiĝon de propra kursejo por la movado. Mi ankaŭ esperas, ke la movadoj en aliaj landoj volas uzi la ejojn por kursoj, renkontiĝoj aŭ turismaj aktivecoj. [...]

La E-movado tamen ne de si mem grandiĝas. Ĉiuj devas helpi. Ekz. vi povas mone apogi la laboron pri la kursejo en Lesjöfors kaj vi povas instigi amikojn, klubanojn, senlaborulojn, gejunulojn k.a. partopreni en niaj kursoj en Karlskoga.

Por pliaj informoj kontaktu: *Lars Forsman, Karlskoga Popola Altlernejo pf. 192. SE-691 24 Karlskoga. Tel: 0586-646 00, 646 14 Fakso: 0586-646 22*

Laŭ la informoj de Lars Forman, gvidanto de la E-fako

Svislando

Programoj de La Chaux-de-Fonds (Postiers 27 - CP 779 - CH-2301)

Kulturaj monatfinoj kun prestiĝaj prelegantoj en 1997
25-26.01 (Daniele Vitali), 1-2.03 (Yves Peyraut), 26-27.04 (Ljubomir Trifonĉovski), 17-19.05 (Jacqueline Poux kaj Etsuko Nakazawa), 28-29.06 (Claude Piron), 27-28.09 (Tazio Carlevaro), 25-26.10 (Reinhard Selten), 29-30.11 (Birthe Lapenna)
Someraj Programoj en 1997
15-20.07 (Noëlle Weyeneth), 22-27.07 (Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer) 29.07-03.08 (*Speciala programo por familioj)*, 5-10.08 (Marco Picasso), 12-17.08 (*Speciala kurso okaze de la mondkongreso de speleologio)*, 19-24.08 (Gian Carlo Fighiera)
Paralele ĉiam okazos kursoj en diversaj niveloj fare de internacie aktivaj instruistoj.

Usono

Mirinda kursaro - *persona raporto pri la pasintjara E-kursaro*

"La kutima somera E-kursaro ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko okazis ĉi-jare de la 24-a de junio ĝis la 12-a de julio 1996. Estis la 28-a sinsekva jaro en kiu Cathy Schultz sukcesis organizi la kursaron kiu estas konata tra la esperantista mondo.

La proksimume 45 studantoj plejparte venis el Usono, sed ankaŭ el Belizo, Brazilo, Danio, Japanio, Kanado, Kostariko kaj Meksiko. La tri instruistoj venis el Usono (Derek Roff), Hungario (Katalin Smidéliusz) kaj Japanio (Kitagawa Hisaŝi). Tio estis laŭ la ofte plenumita tradicio ke unu instruisto venu el Eŭropo kaj unu el Azio.

Laŭaĝe la studantoj variis de dekkelkjaruloj ĝis emeritoj. Per antaŭtesto oni dividis la studantojn en kvar grupojn laŭ lingvonivelo. Ili frekventis la klasĉambron dum tri horoj ĉiutage - aŭ matene aŭ posttagmeze - laŭ nivelo, kaj por hejmtaskoj ili povis utiligi la tempon kiam ili ne estis en la klasĉambro. Ekzistis la ebleco ĉeesti instrusesiojn de ankaŭ alia nivelo, kiel tion faris kelkaj.

Inter aliaj aferoj, Derek Roff kondukis siajn studantojn al la komputila laboratorio kaj provizis al ili sporton pri uzo de komputilaj programoj por memlernado de E-o kaj pri eniro en la Tut-Tera-Teksaĵon (WWW aŭ "world wibe web") de la Inter-Reto por aliri Esperantan informon. Katalin Smidéliusz estis la ĉefa instruisto de la komencantoj - kiujn ŝi instruis Cseh-metode - sed ŝi instruis ankaŭ alinivelajn studantojn pri la arto aŭskulti kaj pri kelkaj tiklaj demandoj de la gramatiko. [...] ... la studantoj vere loĝis kaj vivis dum la semajnoj en Esperantujo. Je la fino eĉ la komencantoj babilis Esperante." ***Stečjo Norwell, (4-a nivelo), Kanado***

La 28-a E-Kursaro ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato okazos inter la 23-a de junio kaj 11-a de julio 1997. La intensiva trisemajna kursaro permesos rapidan progreson al studantoj de komencantaj ĝis progresintaj niveloj, kaj profundigos la

sciojn de spertuloj. Ni aranĝos specialan programon dum la lasta semajno (7-11 julio), kiu kombinos interesajn prelegojn kaj diskutojn kun turismaj eblecoj. Tiu seminario celas e-istojn, kiuj deziras viziti la kursaron kaj la plej belan urbon de Usono, survoje al la UK en Aŭstralio. La Jara Kongreso de ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko) okazos en San-Francisko dum semajnfino post la kursaro kaj antaŭ la UK.
Temoj por la kursaro inkluzivos lingvistikajn aspektojn de E-o, literaturo, kaj kreado de lernmaterialoj. Instruos en kvar niveloj (baza, meza, progresinta kaj supera) D-ro Grant Goodall, profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato de Teksaso en El Paso (UTEP), Derek Roff, kiu kreas perkomputilajn instru-materialojn por la lingvo-departamentoj de la Universitato de Nova Meksiko, kaj Trevor Steele, konata verkisto kaj profesia instruisto de E-o el Aŭstralio. Dorothy Stermer kunordigos la varian kaj distran eksterklasan programon. Ni atendas specilajn prezentojn de Orlando Raola el Kubo kaj Aleksandro Schlayfer el Sovetio (nun ambaŭ loĝantaj en Usono). Studantoj akiros tri studhorojn de universitata kredito. La kosto de la kursaro estos 420 USD. Loĝado kun manĝoj dum la kursaro kaj semajnfinoj estos proksimume 450 USD. Studantoj de la unu-semajna programo pagos trionon. Stipendioj haveblas.
Por plia informo, kontaktu:
Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 84010, tel 415/342-1796, aŭ per e-poŝto Derek Roff derek@unm.edu

***Derek Roff**, Language Learning Center, Ortega Hall Rm 129, University of New Mexico, Tel. 505/ 277-4804. Fakso: 505/ 277-3885*

Uzbekistano

Spertoj de uzbeka kolego pri instruado de E-o al infanoj

Nd/R – Nia uzbeka reprezentanto regule dissendas siajn cirkulerojn, kiujn lastatempe li nomas Babilado. La sekva fragmento devenas el Babilado 3.

[...] "Mi elreviĝis pri instruado de etuloj pri E-o en tiu aspekto, kiel ĝi estis permesita al mi en 1a licco t.e. unu horon semajne. La 7-9-jaruloj deziras nenion studi serioze. Ili simple ne kapablas tion fari. Oni devas instrui ilin pri ĉio en luda formo. Por instrui la lingvon en luda formo oni devas havi almenaŭ tri horojn semajne. Sed la lernejaj aŭtoritatoj ne permesas tion. Mia dujara E-instruado al la etuloj donis nulan rezulton. Jes, la unuan jaron mi instruis nur E-on en du klasoj unuhore semajne. Por la sekva jaro aldoniĝis la angla. Jes, multaj miaj infanoj pli rapide ekposedis la anglan kaj atingis senpene siajn samaĝulojn, kiuj ne studis E-on. Tion ne rimarkis la lernejaj aŭtoritatoj. Sed diri la veron, la plejparto de miaj infanoj studas la lingvojn (ankaŭ E-on!) sen granda entuziasmo, ĉar ili ne estas uzataj ĉiutage, praktike, ankaŭ la angla kun sia magra laŭprograma vortprovizo por la unua jaro. Mi decidis ŝanĝi la taktikon pri la E-instruado, sed pri tio mi rakontos iom sube. La plej grava estas tio, ke la infanoj de mi nun lernas E-on ne devige, kiel tio estis en la lernejo. La infanoj studas la lingvon volonte kaj por la deziro koresponde amikiĝi. [...]

Mi trovis en la apudeco centron de infana tempopasigejo (mi mem elpensis tiun nomon - ĝi nomatas iom aliel). Tie mi aranĝis E-kurseton por lernejanoj, sed mi nomis ĝin *Klubo de internacia koresponda amikado* aŭ amika korespondado. La infanoj venis al mi por skribi leterojn al alilandanoj. Pro tio, mi devas diri, ke mi havas multajn E-lernantojn, kiuj kun plezuro amike korespondas. Ili estas 8-16-jaruloj. Nun mi instruas en tri lernejoj kaj planas viziti la kvaran, kie mi proponos E-instruadon, sed mi ne nomas tion E-instruado, sed *Klubo de* .... Ĉie mi uzas en la komenca stadio de la lernado mian lernolibron. La libro estas tre sukcesa por la infanoj diversaĝaj. Kvankam mi planis ĝin nur por la etuloj.

Mi opinias, malĝusta insisto, ke la komencantaj esp-istoj nepre skribu mem en E-o. Estas granda peno skribi en la fremda lingvo. Kaj ĉiu peno estas problemo, kaj neniu problemo vokas plezuron kaj volonton. En la unua etapo mi mem tradukas la infanajn nacilingvajn leterojn. Estas interese por miaj infanoj, ke sub la nacilingvaj vortoj aperu ilia esperanta ekvivalento. Tiel la lernantoj vidas kiel aspektas kaj iom konatiĝas pri alia lingvo. Same la aliaj pri la rusa. Nun jam ses miaj geknaboj post 3-4-monata lingvostudado memstare skribas siajn leterojn. Kaj mi multe fieras pri ili. Preskaŭ ĉiuj regulaj vizitantoj de la kursoj legas la venintajn leterojn sen mia helpo. La infanoj estas en tiu aĝo, kiam ili serĉas novajn amikojn, ĉar la malnovaj estas tro konataj kaj iom tedaj, kaj la novaj, malproksimaj amikoj ŝajnas multe pli interesaj kaj iom romantikaj. Pro tio ili deziregas korespondi kun aliaj landoj, sed post ricevo de leteroj iuj el ili ne ŝatas respondi, ne scias, kion respondi, ne sentas respondecon, ne komprenas, ke tia sama infano atendas lian (ŝian) leteron sur la alia punkto de la planedo. Plenkreskulo devas memorigi ilin pri tio! Tiu plenkreskulo povas esti instruisto, patr(in)o aŭ alia bonvolulo. Estas tre GRAVE, ke la leteroj de ni venu al la adreso de la klaso, instruisto, plenkreskulo. Kaj la infano ricevu siajn leterojn en la lernejo, de la plenkreskulo. Tiam la korespondado estos kontrolata kaj akcelata. Ĉar se iu infano rifuzos plu skribi leterojn, iu alia skribu al mia lernanto. Ankaŭ mi zorgos, ke via lernanto ĉiam havu leteramikon. Iom post iom la infanoj alkutimiĝas al la koresponda disciplino kaj fariĝas respondecaj." [...]

***Eŭgeno S. Perevertajlo**, ab/k 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, Uzbekistano,*
tel: 57 24 87, retadreso: eugeny@esper.gimli.com

PROJEKTO-KLERA – profesia formado de E-kursistoj

(Meditado okaze de bona, porinstruada programo)

La novaĵo:

Somere 1996 efektiviĝis la du plej intensaj etapoj de fruktodona programo PROJEKTO - KLERA, kadre de kiu 7 entuziasmaj samideaninoj ricevis profundan kaj profesian formadon rilate E-gramatikon, (inter)-lingvistikon, literaturon, movadhistorion, ideologion kaj metodologion. La iniciato celis mem produkti proprajn kursgvidantojn kaj per tio fari paŝon, kiun ILEI nuntempe pro financaj (kaj eble aliaj) mankoj neglektas.

La novaj kursistoj jam ekagis gvidante plurajn kursojn kaj programojn, organizitajn de la iniciatintoj kaj finacintoj de la projekto.

Aldonaj klarigoj:

La ideo de LF-koop trovi, eduki kaj laborigi proprajn kursistojn estis plurvidpunkte bona investo.

La koncepto "kursisto" estas pli ol tradicia lingvoinstruisto. La trejnitaj disĉiploj krom instruado de Esperanto estas kapablaj laŭ personaj interesiĝoj ankaŭ prelegi pri diversaj temoj, gvidi specialajn fakajn programojn.

La partoprenintoj (kies lingvonivelo de E-o devis estis bona, kaj ili devis koni almenaŭ unu alian fremdan lingvon krom la gepatra) devenis el du grupoj. La malnovaj stabanoj de LF-koop estis spertaj rilate movadajn aferojn, dum la studentoj de la Pedagogia Altlernejo de Szombathely havis lingvoinstruistan praktikon. La teoriajn prelegojn kaj la praktikajn ekzercojn la kandidatoj ĉeestis parte kune, parte laŭ antaŭa prepariteco.

La dufoje unusemajnan intensan ĉeestan programon (unu semajno en Budapeŝto, unu en La Chaux-de Fonds) kompletigis plurmonata malĉeesta formado, laŭ programita plano kun pluraj individuaj taskoj. La formado dediĉis grandan atenton por la praktiko de la instruado. La kandidatoj prezentis plurajn modellecion(er)ojn, solvis vivsimilajn dumkursajn situaciojn, kolektis kaj preparis propran ilaron por la lingvoinstruado kaj skizis komunan koncepton por eventuala kursmaterialo.

Kvankam fine de aŭgusto la partoprenintoj estis taksataj kapablaj por instrui E-on al diversnacia kursaro kaj kelkaj jam provis sin ankaŭ en fakaj programoj, LF-koop ne opinias la projekton finita. La ĉefaj trejnistoj Giorgio Silfer kaj Katalin Smidéliusz kontinue zorgas pri la plua formado de la disĉiploj, provizas ilin per legind(end)aĵoj, ekzercoj kaj apartaj taskoj por plivastigi iliajn konojn kaj spertojn.

La meditado:

Kial mi helpis ellabori kaj efektivigi la programon de la projekto? Estis tri ĉefaj kialoj.

Unue: ja en mia altlernejo, sub miaj manoj formiĝis pluraj bonkapablaj kaj entuziasmaj esperantistoj, kiuj post la diplomiĝo, manke de spertoj kaj ebloj en Esperantio, povontus perdiĝi, kaj mi bedaŭris la investitajn energiojn.

Due: mi ĝojis, ke troviĝis organizo, preta investi por trejni propran armeon, ja por la "soldatoj" la partopreno estis preskaŭ senpaga.

De longa tempo ne plaĉas al mi la ideo, ke en nia movado la batalantoj de/por la komuna ideo devas investi tro da mono (krom la energio kaj libertempo) por disvastigi nian lingvon.

Trie: mi ne ŝatas, ke E-on rajtas kaj kuraĝas instrui kiu ajn sen bona lingva kaj kultura preparo. Estas bedaŭrinda manko, ke ILEI ne povas dediĉi pli da energio kaj mono por organizita formado, profesia ekzamenado, registrado kaj plua trejnado

de kvalifikitaj, jam praktikantaj E-instruistoj.

Pli kaj pli ofte oni sentas la bezonon de metodologiaj kursoj.

Por plenumi la mankon nur mi mem lastatempe gvidis (krom la tradiciaj Cseh-metodaj) plurajn metodologiajn seminariojn laŭ la mendo de lokaj kaj regionaj asocioj, kulturcentroj en Norvegio, Pollando, Germanio, Danio, plurfoje ankaŭ en Francio. Plej ofte la organizantoj akiris la financan bazon por tiuj seminarioj helpe de fondusoj. En la programoj partoprenis ĉiam inter 15-20 instruemaj samideanoj, plejparte el la pli juna generacio. La seminarioj daŭris ĝenerale unu plenŝtopitan semajnon kaj la partoprenintoj de la (ne-Cseh-aj) ĝeneralaj metodikaj trejnadoj post diligenta laboro devis kontentiĝis "nur" pri la akiritaj scioj kaj spertoj.

Mi ofte bedaŭris, ke mi ne povas premii ilin per oficiala atesto, aprobita de la ILEI-estraro. Mi konscie uzis la vorton "atesto" kaj ne "diplomo", ja eĉ plenŝtopita semajno ne povas sufiĉi por alproprigi la sekretojn de tiu profesio (sincere dirite de neniu), sed atesto povas pruvi paŝojn sur tiu malglata vojo.

Konkludo kaj demandoj:

PROJEKTO - KLERA klopodas modele kaj altnivele zorgi pri la kursistaj bezonoj de LF-koop, espereble je kontentiĝo kaj kleriĝo de multaj samideanoj.

Sed kiu(j) zorgos pri la trejnado de E-instruistoj por la (ideologie kaj geografie) aliaj partoj de Esperantio? Ĉu ĉiu organizo solvu tion laŭ propraj spertoj kaj ebloj, sen la kunordiga helpo kaj aprobo de ILEI? Ĉu ne estus bone laŭ organizita formo altigi nian prestiĝon je profesia nivelo?

Kiel vi vidas nian estontecon rilate la instruadon de nia lingvo?

Viajn reagojn ni atendas je la adresoj de la redakcio de IPR.

dr. ***Katalin Smidéliusz****, metodikisto*

Sabine Trenner - Erika Tóth:

Spertoj de internacia infana interŝanĝo

[NdlR - Erika el Hungario estas instruistino kaj studas la germanan lingvon, Sabine kaj Christian venas el Germanio. Sabine studas socialan pedagogion, Christian psikologion. Erika kaj Sabine hejme gvidas E-kursojn por lazlernejanoj, 7 - 12 jaraĝaj.]

Somere 1995 ni kunvenis por konkrete priparoli la kunlaboron: organizi junularan interŝanĝon en niaj du landoj kun niaj idoj. Financado, datoj kaj lokoj de la renkontiĝoj, nombro kaj aĝo de la partoprenantoj... pri tio ni rapide interkonsentis. Temon por la programo, por akiri subvenciojn kaj por havi specialan kadron, kiu donu al la renkontiĝoj kroman sencon, ni trovis en "kulturo kaj tradicio".

La unua etapo de nia duparta projekto nun jam estas pasinteco. Ni renkontiĝis de la 6a ĝis 12a de aprilo 1996 en Budapeŝto. La dua renkontiĝo okazos de la 4-a ĝis 11-a de oktobro en Brandenburgio.

Ni volas per tiu ĉi artikolo doni malgrandan superrigardon pri la aranĝo kaj kuraĝigi tiujn, kiuj revas pri vigligo de internacia infana interŝanĝo, sed hezitas fari la unuan paŝon.

Financado:

Subvencion ni ricevis de la Germana Federacia Ministerio pri Familio, Senioroj, Virinoj kaj Junularo. Tio koncernas parte vojaĝkostan subvencion al Hungario kaj restadkostojn en Germanio. La germanaj infanoj krome devis pagi partopren-kotizon. Per tiu partoprenkotizo ni ebligos por ĉiuj infanoj la restadon en Germanio kaj pagos la preparajn, asekurajn kaj programajn kostojn.

En Hungario la renkontiĝon subvenciis la Centra Junulara Fondaĵo de la hungara ministerio pri klerigado. Per tiu subvencio malpliigos la vojaĝkostoj al Germanio. La hungaran restadon pagis la gepatroj kaj la lerneja fondaĵo.

Ĉefaj celoj de la renkontiĝoj estas:

+ krei grupan senton dum la renkontiĝoj, por ke estonte kresku partnera amikeco,
+ malaperigi iliajn timojn pri fremdaĵoj kaj fremduloj,
+ konatigi ilin kun alia vivcirkonstancoj kaj kulturoj de homoj,
+ ebligi al ili, sentime kaj ĝoje uzi la freŝe lernitan lingvon.

E-instruadon ni metis en la lastan lokon, ĉar laŭ ni la plenumo de la unuaj celoj estas kondiĉo por la volontula realigo de la lasta.

Partoprenantoj:

Niaj "viktimoj", dek geknaboj el Gyál (Hungario), 11-13 jaraĝaj kaj naŭ geknaboj el diversaj regionoj de la federacia lando Brandenburgio (Germanio), almenaŭ ion antaŭe sciis pri E-o. La germanaj infanoj partoprenis minimume unu ferian E-tendaron kaj tie sekvis E-kurseton. Sed ili plejparte ne estas en lokaj grupoj, sekve nur neregule havas la eblecon, uzi kaj lerni E-on. La hungaraj geknaboj lernas la germanan en lernejo kaj krome havis kelkajn E-lecionojn. Sekve la E-lingva nivelo ne estis alta.

Komuna planado kaj demokratia gvidstilo

Dum grupaj kunvenoj kaj en Gyál kaj en Potsdam la infanoj prepariĝis al la evento. La gelernantoj interkonatiĝis kun la programo, aldonis ideojn kaj transprenis specialajn taskojn, per kiuj ili volis kontribui al la aranĝo. Verŝajne tiu ĉi fazo ebligis al la infanoj senti la aranĝon propra, kies sukceso, etoso, vigleco dependas ĉefe de ili mem.

La grupojn (aŭ - en Budapeŝto poste- la grupon) ni gvidis laŭ la demokratia stilo. Kompreneble kelkajn neŝoveblajn kadrajn kondiĉojn ni ĉiuj devis akcepti. Demokratia stilo signifas, ne ni donis multajn ordonojn, sed la infanoj mem rajtis decidi pri la plejmulto de la programa enhavo kaj pri organizaj aferoj. Diskuto kaj interkonsento inter la infanoj kaj la plenkreskuloj pri farendaĵoj tute ne estis la problemoj. Kontraŭe:

ni havis la impreson, ke tiuj - por ili nekutimaj - kundecideblecoj instigis ilin al pli granda transpreno de respondeco. Eble tial ni sukcesis fari unu grupon el la antaŭaj du dum relative mallonga tempo.

Rolo de ludoj kiel "metodikiloj"

Por atingi tiujn celojn ni volis - apud interesa tema programo - uzi plejparte ludojn. Tiujn ni elektis por la grupiga procedo laŭ jenaj kriterioj:

+ la ludoj ebligu pozitivan sperton, trovante komunaĵojn,
+ ili estu interesaj kaj ĝojigaj,
+ ili ebligu la maloftan uzon de nacia lingvo,
+ ili devigu la infanojn al kunlaboro.

Per tiuj ludoj ni volis i.a. malaperigi timojn kaj malcertecojn, doni kontakt-eblecojn kaj krei agrablan enirmanieron en la teman programon.

Kompreneble la "eniro" kaj "varmiĝo" okazis helpe de interkonatigaj ludoj. Tiuj devis plenumi ankoraŭ aliajn kondiĉojn, ne nur la supre menciitajn:

+ ili ebligu, ke ĉiu relative facile povus kunludi,
+ ili ne estu komplikaj,
+ sen granda pripenso ĉiu povu spontane ekparoli, se necesas,
+ ili ne estu tedaj kaj longdaŭraj.

La interkonatiĝon ni komencis per simplaj cirklaj ludoj, dum kiuj ĉiu sin prezentas per nomo kaj movo. Ĉiuj en la cirklo devas ripeti nomon kaj movon. Tiu ludo estas konata, tial ni ne volas mencii ankoraŭ la diversajn variantojn, kiujn ni elprovis. Sekvis intervjuoj. Ĉiu devis intervjui nekonatulon kaj poste prezenti tiun al la tuta grupo. Ni permesis uzi iun ajn lingvon por la intervjuo kaj por la prezentado kaj ni surpriziĝis, kiam la unuaj komencis prezenti la partneron uzante E-on(!). Sekvis kromaj cirklaj ludoj, sed la unua timo jam ŝajne estis for. Ni daŭrigis per konkurso en du miksitaj grupoj. Necesis diveni diversajn "kvalitojn" de la alia grupo. Ni demandis pri la komuna grandeco de la grupoj, pri la nombro de lernitaj lingvoj, pri la kuna aĝo... por plenumi tiujn taskojn necesis nepre interparoli kaj diskuti. Por klarigi la taskojn ni devis de tempo al tempo traduki al la naciaj lingvoj, sed tio tute ne ĝenis.

Kiel agrabla fino de la unua ludrondo kaj bona enirejo en la teman programon sekvis la serĉado de paskaj ovoj kaj dolĉaĵoj. Tiujn aĵojn la germanaj infanoj matene kaŝis. Tiu germana tradicio estis granda surprizo por la hungaroj, kiuj devis serĉi. Poste ni ricevis informojn pri la hungaraj paskaj tradicioj kaj ĉiu ricevis ornamitan ovon.

Ni speciale preparis por la unua vespero tielnomatan "planludon", kiu garantiis al ĉiu sukceson, sed kies fina rezulto estas atingebla nur el la kunlaboro de la unuopaj grupoj. La luda enhavo laŭ kadra rakonto harmoniis kun la paska festo. Pluse la geknaboj, laŭ surloke preparitaj fotoj kaj mapetoj, pli bone konatiĝis kun la renkontejo, orientiĝis tie. Ni dividis la infanojn al kvar grupoj. Tiuj grupoj estis hungare/germane miksitaj. Denove montriĝis, ke ili kune, sen nia interpretista helpo, bonege kapablis

interkomuniki kaj eĉ esprimi la problemojn kaj solvi la taskojn.

Dum la sekvaj tagoj ni enŝovis ĉiam novajn ludojn. Temis parte pri senkonkurencaj ludoj, parte pri konkursaj sportludoj, parte pri paroligaj aŭ kunlaborigaj. Pri la uzo de nuraj lingvaj ludoj ni rezignis.

Problemetoj...kaj fino

Gravajn problemojn, instigi la infanojn al ludado, ni ne havis. La germanoj kutimas ludi. La hungaraj knaboj komence estis iomete retiriĝemaj. Eble, ĉar ankoraŭ ne klaris, kiu el la grupo estos la "ĉefo" inter la gejunuloj, eble, por montri, ke ili jam estas tro plenkreskaj por ludi...

La ĉefa "inicianto" de iuj bojkot-provoj ĉiam havis la gvidantan rolon en la ĝisnunaj grupoj (klaso, tendaro ktp.): li estis la plej kapabla, lerta (kaj diable, eĉ inter la knabinoj la plej "sukcesa".) Ŝajne la unuan fojon li spertis, ke ne ĉiam estas tio evidenta. Li renkontis samkapablajn, -sukcesajn knabojn kaj ŝokiĝite pri tio li elektis la "bojkot-teknikon", kiun la aliaj hungaraj knaboj sekvis. Bonŝance ne longe! Kiam li restis sola bojkotanto, li (pli malpli sukcese) akceptis la por li novan situacion kaj fariĝis grupano.

Tio okazis en tiu tago, kiun ni pasigis en la vilaĝo Gyál. Posttagmeze kaj vespere ĉiu hungara infano havis gaston el Germanio hejme. Tio estis la lasta tuŝeto, kiu ebligis al la knaboj transsalti la kontaktan barilon.

Fakte estas tiel, ke ekde la unua tago ni ne havis gravajn problemojn kun la idoj. Eĉ se okazis, ke iu el ni ne povis ĉeesti, neniajn kverelojn ni devis poste klarigi, ne havis malfacilaĵojn pro la disciplino. En la grupo regis de komenco relative bona etoso kaj la grupoj ŝajnis al eksteruloj esti nur unu grupo.

Se ni memoras la scenojn, kiuj okazis en la stacidomo, kiam la germanoj devis hejmenveturi, se ni rememoras la ĝojigan esperon en la okuloj de niaj infanoj, ke la hungaroj venos oktobre al Brandenburgio, tiam ni certas, ke ne nur ideale kunlaboranta teamo, bonaj kondiĉoj kaj bone preparita programo kreis tiun etoson, sed "kulpas" ankaŭ la cele uzataj metodoj de la luda pedagogio kaj la harmonio en la kunagado kun niaj idoj.

***Erika Tóth**, HU- 1182 Budapest, Halom u. 61/B*
***Sabine Trenner**, DE -10249 Berlin, Ebertystr. 46*

Protokolo de Vanelkibico

[NdlR - Ni volas prezenti al vi la sekvajn protokolojn pri iu Esperanta arangxo. La skribinto, Vanelkibico, vivas ekstere de nia movado. Bona ebleco konstati, kiamaniere la ekstera mondo nin vidas. Hazarde, el sekreta fonto, ni ricevis la skribaĵojn. Mem prijuĝu!]

Protokolo de Vanelkibico. Parto III/1

Estas la tielnomita tria metodika seminario de la E-Junularo Brandenburgio- Berlino. Mi eksciis el regiona gazeto pri ĝi. Min interesas, ĉu tiuj adeptoj de la lingvo E-o

sukcesos iam ajn subfosi la firmajn grundojn de la germana lingvo. Tial mi intencas observi ilin.

Ĵaŭde, 31-a de oktobro 1996. Berlino, Germanio. **11-a horo antaŭtagmeze, en iama infana tendaro.** Kolektiĝis 14 personoj el Pollando, Germanio, Anglio, Hungario. Ĉefino de komenco estas iu Katalin Smidéliusz, hungarino. Laŭdire la aliaj volas lerni instruadi la Internacian Lingvon. Evidente kelkaj jam instruis. Oni povas aŭdi ion pri interŝanĝoj de kursgvidantoj el Varsovio kaj Berlino, kiuj dufoje okazis kiel rezulto de la maja seminario. Ili parolas pri A- kaj B-seminario laŭ Cseh-metodo, kiun ili nun partoprenas aŭ daŭrigas.
Ĉirkaŭitaj de dikaj libroj ili prezentas unu la alian. Ili regas la lingvon bone - laŭ mia kompreno.
16-a horo. Ili nun eĉ ludas! Dancas iun "Hoki-Koki"-dancon tiamaniere lernante korpajn partojn.
17-a horo. Ŝvitante ili skribas teston pri gramatiko.
18-a horo. Jam aŭdeblas voĉoj, ĉar estas tro da gramatiko.
20-a horo. Ili organizas iun spektaklon. Rolludojn.
22-a horo. En kabano iu sidas kaj preparas ludojn por la sekva tago.

Protokolo de Vanelkibico. Parto III/2

Vendrede, 1-a de novembro. Sama loko. 8-a horo matene.
Alvenis grupo de 6 gejunuloj el Varsovio. Ŝajnas, ke ĉiu konas ĉiun. Estas nun jam 20 personoj. *Jes, evidente tiu internacia sekto bone kaj intense kunlaboras.*
9-a horo. Denove ludoj. Poste gramatiko. La A-grupo analizas filmon pri la sekreta metodo. La B-grupo dume provas trovi vojon el la "nebulitivo".
Subite feliĉa ekkrio! Iu eltrovis, ke *mankas ne bezonas akuzativon.*
15-a horo. Modela leciono de unu el la ĉe-adeptoj. Preskaŭ ĉiuj kuŝas ridegante sub la seĝoj. Ili ne sciis, ke Zamenhof havis hejme fiŝojn, kiuj parolis E-on. Nur pro ili la ~~okultisto~~ okularisto eltrovis la akuzativon de la rekta objekto. *Mi nepre devas aldoni la rakonton, por montri, kiel dangere povos esti, lasi ilin eltrovi klarigojn por gramatikaĵoj*: "La fiŝoj Paŭlo kaj Petro naĝas en la baseno. Paŭlo malsategas. Vidante Petron, Paŭlo ĝin emas tuj formanĝi. Petro krias: "Vi manĝas. Mi ~~ne volas esti via~~..." Kompreneble Petro ne fuĝis sufiĉe rapide, tial ĝi nur povis krii: "Vi manĝas mi n..." kaj la reston forglutis Paŭlo. Tiamaniere ekestis la akuzativo.
17-a horo. B-anoj skribas teston pri la verda apostolo Cseh. El la enhavo: "... A. Cseh estas al ni pli proksima ol sinjoro Apud ankaŭ tial, ĉar iu apud estas pli for ol ĉe ..." Poste ili ludas.
20-a horo. B-anoj gramatikumas. A-anoj preparas modelajn lecionojn.
23-a horo. B-anoj gramatikumas. Iu eltrovis la veran "fatalitivon".
3-a horo de la sekva tago. Kelkaj noktaj fantomoj pridiskutas "fraz-ologion". Aliaj kreas

revante modelajn lecionojn. La ĉefino forĵetas sian ruĝan globkrajonon, ŝovas la kontrolitajn testojn en iun angulon kaj iras dormi.

Protokolo de Vanelkibico. Parto III/3

Sabate, 2-a de novembro. Sama loko. 9-a horo matene.
Dum la vortfarado ili konstatis, ke libertempo ne rajtas ekzisti en E-o.
11-a horo. Modelaj lecionoj. Bedaŭrinde la fiŝoj jam estas formanĝitaj.
14-a horo. B-anoj gramatikumas kaj prikritikas diversajn lingvajn stilojn. La aliaj A-umas, analizas filmojn aŭ preparas modelajn lecionojn.
17-a horo. Protesto pro testo pri metodiko. Sed la B-anoj devas esti turmentataj, alikaze ili eble pensas, ke tamen ekzistas libertempo. La A-anoj ankoraŭ ne konas la vortfaradon kaj havas libertempon.
19-a horo: Gramatikumante iu eltrovas ke elipsaj frazoj estas tiuj, kiujn oni konstruas tiel, ke la posta leganto devas uzi sian fantazion, por aldoni enhavon. A-anoj preparas modelajn lecionojn.
22-a horo. Kelkaj kreas verve novajn gramatikajn terminojn. A-anoj Mazi-umas.
2-a horo de la sekva tago. Pro sufiksoidoj sufiĉas al iuj idoj la strebado kaj kelkaj kuŝas ĉe kaj apud PIV kaj PAG en la litoj.
3-a horo. Mihail elŝaltas la lumon kaj iras dormi. Katalin provas deĉifri la lastajn testojn.

Protokolo de Vanelkibico. Parto III/4

Dimanĉe, 3-a de novembro. Sama loko. 9-a horo matene.
Ili devas skribi teston pri gramatiko. Nun evidentiĝas vere, ke "fatalitivo" estas alia vorto por ekzameno. Ili konstruas multajn elipsajn frazojn, konsciante pri la fantaziaj kapabloj de la ĉe-fino. La aliaj preparas modelajn lecionojn.
12-a horo. Post la forviŝo de la elŝvitita akvo la A-anoj prezentas la modelajn lecionojn. Konkludo: por iĝi Cseh-instruisto oni bezonas pli ol volon. Ne kvanto, sed kvalito validas. La plej junaj, 16 kaj 18 jaraĝaj, sukcesas.
14-a horo. Disdono de dokumentoj. Dum la seminario bakiĝis novaj Cseh-instruisto-kandidatoj. Du faris la A-ekzamenon, ok sukcesis venki la B-fatalitivon.
16-a horo. La unuan fojon oni povas vidi kelkajn el la partoprenantoj ĉe la bordo de apuda lago, kie ili kvin minutojn restas, por poste adiaŭi.

Seminara resumo. Mi jam aŭdis, ke kelkaj el ili volas nepre serĉi la perditan aperitivon. Laŭdire ĝi estas alia formo de konversacio kaj konservacio. Mi ne scias. Sed mi vidas, ke jen danĝero por la estonteco povus kreski, ĉar tiuj falsaj sektanoj volas daŭrigi la internacian laboron. La meza aĝo de la A-sukcesintoj estas nur 17 jaroj! Tiu de la B-anoj 27! Ili havas ankoraŭ multajn jarojn, kiujn ili povus uzi, subfosi la naciajn lingvojn! Mi esperas, ke tiu malsaneco ne famiĝos.

Golden, Declerck, Macioszek – IPR 95-96

"Mi ne konsentas kun la plejparto de viaj verkintoj pri la propono de Akademiano **Bernard Golden**. Mi trovas lian proponon laŭfundamenta, ĉar la Leĝo de Ekonomio (*"...se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti eljetata kiel neutila kaj nenecesa." Oficiala Gazeto, majo, 1913 - de nun "LE"*) estas fundamenta kaj permesas la forigon de sufiksoj sen la allaso de io konfuza.

Esprimoj kiaj "*la fenestro fermas*" kaj "*la tasko finas*" ne estas dusencaj, nur elmontro de LE aganta sur "*la fenestro fermiĝas*" kaj "*la tasko finiĝas*". Jam ekzistas la duobla esprimpovo de verboj kiaj "*danci, manĝi*" ktp.; Golden simple aldonas al tiu klaso de verboj duoble transitivaj-netransitivaj (*de nun "(n)tr"*) subklason de tiaj verboj, kies gramatike transitivaj objektoj (*same kiel la subjektoj de "danci", ktp.*) servu kiel netransitivaj subjektoj.

Tio aplikiĝas nur al pure unusencaj kazoj; restas la kutimaj esprimoj por aliaj kazoj *(ekz. "naski")*, do, la kategorio de tiaj verboj malmultiĝas dum kreskas la nombro de simplaj (n)tr-aj verboj. Ju malpli da finaĵoj *-ig-* kaj *-iĝ-*, des pli da simpleco kaj lernebleco de E-o.

Simpla lernebleco estas grava argumento por E-o. S-ano **Declerck** (IPR 3/96, p. 20-30) plendas pri malpli da precizeco; precizeco ja estas virto, sed simpla lernebleco estas pli grava en E-o. Oni rimarkas, ke laŭ PIV "*remi*" estas pure netransitiva verbo; mi trovas "*li remas boaton*" pli simpla, pli eleganta, pli facile komprenebla, kaj pli facile lernebla ol "*la boato estas remigata de li*". Ne levu demandon pri francismo aŭ anglismo en E-o sed nur pri esprimpovo. Kaj uzu la kutimajn sufiksojn en kazoj de dubo aŭ ebla malprecizeteco.

La proponojn de **Macioszek** mi trovas ridindaj, sed eĉ liaj tordaj, malelegantaj frazoj trovas admiron ĉe s-ano Nordin (IPR 3/96, p. 31). Mi mem ne akceptus tiajn proponojn, ĉar mi konsentas al la Zamenhofa saĝeco eviti la gramatikan uzon de vortordo. Eble kelkaj samideanoj ne scias, ke ne ekzistas universale konsentita vortordo. Do, ĉiu propono meritas ie konsideron, se nur por rebato.

Serioza akademiana propono meritas diskuton en IPR. La Esperanta verbo estas tre kompleksa. La manko de klara ekstera signo pri transitiveco aŭ netransitiveco estas fuŝo en iu planlingvo. Tiu fuŝo estas fundamenta kaj ne facile korektebla de nia Akademio. Ĝi kondukas al la instruado de longaj listoj de verboj transitivaj aŭ netransitivaj aŭ (n)tr-aj kun aparta atento al "falsaj amikoj" el la lernanta nacilingva verbaro. Tia instruado estas tiom konfuza kiom tiu de nacilingva instruado, tiel, malrekomendo por la supereco de E-o.

Ni danku al Akademiano Golden por simpligo de tiuj listoj. Eĉ se ne vaste akceptitaj, liaj proponoj montru la vojon al pli da provoj je la marĉo de la Esperanta verbo.

***Arnold Victor**, Nov-jorkurbo*
arvimide@mars.superlink.net

La Esplor-kreiva vojo... IPR 96/4 p. 26-27.

De kiam mi donis la recenzotan ekzempleron al Stefan la aferoj iom sanĝiĝis. Tiel la prezo nun estas 9 NLG plus sendokostoj, kaj la verko estas nur aĉetebla ĉe la libroservo de UEA en Rotterdam.

Pri rekta persona sperto mi sciigas, ke mi pretas gvidi seminariojn por eduki instruantojn en la Esplor-kreivan medion. La Esperanto kurso enhavas 22 kartojn, A4 kaj A0 formataj, kiujn interesiĝantoj rajtas kopii. La kurso pleje taŭgas por lernantoj kiuj jam iom regas iun fremdlingvon. [...]

***Une Hukstra**, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando*

Alvokoj de nia sekretario

Invito al E-pedagogoj

ILEI siatempe organizis Internacian pedagogian ekzamenon, kiun sukcese trapasis pluraj dekoj da E-instruantoj (diplomitaj Internaciaj pedagogoj de E-o).

Estus interese scii kiel ili hodiaŭ utiligas la akiritajn sciojn. La posedantoj de la ekzameno bonvolu turnu sin al la sekretario de ILEI.

ILEI-anoj en la reto

Kiom da ILEI-anoj kaj E-instruantoj estas atingeblaj rete? La respondo estas diskonebla nur post via sinanonco. Sendu mesaĝon al la sekretario de ILEI Marija Beloŝević: Retadreso: Marija.Belosevic@public.srce.hr

Ĉiuj kontribuantoj ricevos tutan ret-ILEI-adresaron.

Esperanto en lernolibroj

ILEI daŭre kolektas informojn pri la mencio de E-o, Zamenhof, homaranismo kaj aliaj planlingvoj en la diverslandaj lernolibroj (por ĉiuj aĝoj). Ĝis nun la sekretarion de ILEI atingis deko da informoj (i.a. angla, nederlanda, korea, makedona). Bv. sendi kopion, E-resumon kaj bibliografiajn detalojn de la koncernaj tekstoj (informante kiel ili estas utiligataj) al la sekretario de ILEI: Marija Beloŝević (adreso kovrilo 2) ĝis la 10-a de marto 1997.

ILEI- servoj

Se vi estas E-parolanta instruisto pri iu ajn fako kaj deziras kontakti vian samfakulon; se vi estas E-instruanto kaj bezonas konsilojn pri la uzado de diversaj lerniloj (novaj kaj malnovaj); se vi deziras gvidi E-kursojn eksterlande aŭ gastigi alilandan E-instruanton ILEI pretas helpi al vi!

Sendu vian adreson kaj mallongan priskribon pri la bezono al la sekretario de ILEI.

Korespondpetojn por viaj lernantoj direktu al la adreso de nova redaktoro de *Juna amiko*: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Internacia Konkurso pri Modela E-parolo

Ankaŭ ĉi jare ĝin organizas ILEI-Komisiono pri Lernejaj Konkursoj. Konkursi rajtas E-lernantoj de 15 ĝis 19 jaroj.

Ĉiuj instruistoj, kies lernantoj deziras partopreni en la konkurso, informu la organizanton, prof. Ivan Bekavac-Basiĉ ĝis la 3-a de februaro 1997.

***Marija Beloševiĉ**, sekretario de ILEI*

Al la Sekciestroj kaj Reprezentantoj de ILEI en Eŭropo

(Publika letero de Raymond Wyllemann)

Estimataj Kolegoj ,

*– **'Eŭropo en la klaso'**, ĉu necesas?*

– Certe. Sed kion kaj kiel fari?

Ni ne teorumu pri konstruenda Eŭropa Komunumo, sed ni montru al la gelernantoj vivantan Eŭropon.

Ni helpu la infanojn kaj la gejunulojn por ke ili interkonatiĝu, sed unuavice por ke ili ekkonu sin mem, por ke ili akceptu sin kiaj ili estas. La malprava malŝato kaj la neakcepto de si mem estas ja ofte fontoj de netoleremo kaj rasismo. Gravas do ke la gejunuloj lernu la ecaron de la propra kulturo, la morojn de sia regiono, la sociajn kutimojn kaj la politikajn instancojn de sia lando.

Poste ili estos invititaj renkonti la aliajn, ties landon, ekkoni kulturojn, lingvojn... per interŝanĝado de leteroj, kasedoj, vizitoj .

Ne povas manki informado pri la eŭropaj instancoj, la origino de Eŭropo kaj la aktuala plivastigado de la Eŭropa Unio.

Tuta programo! Ne nur por la gelernantoj sed unualoke por la geinstruistoj! La unua tasko ja estas la sentivigo de la eŭropa dimensio. Por helpi vin ekzistas asocioj, ĉe kiuj vi trovas informojn **pri eŭropa edukado**:

PLEASE - Permanent Liaison Committee of European Associations in Education (Konstanta Interliga Komitato de Eŭropaj Asocioj pri Edukado)
Adreso: rue de la Concorde 60, BE-1050 Bruxelles

Tie vi povas informiĝi pri i.a.

AEDE: Eŭropa Asocio de Geinstruistoj
Koningsholster 64, NL-6573 VV Beek-Ubergen, Nederlando

ATEE: Asocio pri porinstruista edukado en Eŭropo
Rue de la Concorde 60, BE-1050 Brussel, Belgio

CEEC: Eŭropa Komitato de la Katolika Instruado
Rue de l' Industrie 42/10, BE-1040 Brussel, Belgio

ECNAIS: Eŭropa Konsilantaro de Naciaj Asocioj de Sendependaj Lernejoj
Langes Gaard 12 2tv, DK-4200 Slagelse, Danio

ESHA: Asocio de Eŭropaj Mezlernejestroj
c/o CEVNO Nassauplein 8, NL-1815 GM Alkmaar, Nederlando

GERFEC: Eŭropa Grupigo de Studado kaj Esplorado pri la formado de Kristanaj Geinstruistoj (Ne hezitu direkti vin al GERFEC, *rue Trubner 5* - preferinde franclingve - *FR-67000 Strasbourg fakso 88 36 70 74* aŭ rekte al la landa reprezentanto.)

Ĉu endas aldoni ke dum la internaciaj renkontiĝoj de tiuj asocioj la plej granda malfacilajo estas la lingva problemo? Ili spertas ja la plurlingvecon de Eŭropo. Tial ni povas proponi E-on kiel solvon. Ni tamen ne altrudiĝu. Tiu ĉi letero ne estas alvoko por klopodi esperantigi la menciitajn grupojn. Ĝia celo estas instigi vin al kunlaborado en la asocio(j) kiu(j) interesas vin, tiel ke vi povas veki intereson pri E-o. Poste, kiam pluraj Esperanto-parolantoj ĉeestos la kunvenojn, la internacia lingvo povos esti proponata por helpi al la solvado de la lingvaj problemoj.

Sciigu ke vi ricevis la informojn pri la asocioj per ILEI. Informu viajn kolegojn. Bonvolu sciigi al mi viajn spertojn rilate al ĉi tiu agado.

***Raymond Wylleman**, ILEI-estrarano pri eksteraj rilatoj*
August Vermeylenstraat 65, BE-8400 Oostende, Belgio, tel. 059-502708, fakso:0032-59-802342 (por RW), retpoŝto: van.glabbeke@ontonet.be

Korekto

En IPR 4/96, sur la 10-a paĝo aperas la erara siglo de SES (Svisa Esperanto Societo) anstataŭ SIS (Svisa ILEI-Sekcio). Nia redakcio erare "korektis" la originalan tekston. Pardonu! (*J.N.*)

Ni kondolencas

La 28-an de septembro 1996 en Sofio mortis **Marin Bacev**, sperta E-instruisto, membro de ILEI. Li instruis la internacian lingvon i.a. en Francio, Britio, Svislando kaj ekz. 7 monatojn ankaŭ en Kubo. Dank' al Esperanto li vizitis ĉ. 30 landojn en Eŭropo, partoprenis ekstereŭropajn Universalajn Kongresojn en Pekino, Seulo, Vankuvero kaj Havano. De aprilo ĝis junio 1996 li gvidis plurajn kursojn en Litovio. Restu li en memoro de liaj gelernantoj.

Laŭ informoj de Litova Stelo 4/96 kaj 6/96

Leterkesto

"...Koncerne ILEI kaj IPR mi rekomendas, ke ILEI kaj IPR, kunlaborante kun aliaj organizaĵoj, estu/restu libera. Ĝi kuraĝigu instruadon de Esperanto sendepende de desubismaj aŭ desuprismaj preferoj."

Blazio Vaha, HU-1031 Budapest, Vitorla u. 7. Hungario

Ni gratulas

Katalin Smidéliusz en junio 1996 en la budapeŝta ELTE universitato kun "summa cum laude" defendis sian doktorigan disertaĵon pri esperantologia temo: Propedeŭtika valoro de Esperanto, favora al la instruadon de la itala lingvo al hungaraj infanoj. Pri la temo IPR publikigis artikolon en la numero 1995/2. La doktoriga ceremonio okazis fine de oktobro 1996. Gratulojn al ŝi!

Recenzoj

ESPERANTO-TESTLIBRO (NE NUR) POR HUNGAROJ

Ankoraŭ en la jaro 1995 aperis la dua, reverkita kaj kompletigita "*Eszperantó Tesztkönyv Állami Nyelvvizsgához*" (**Esperanto-Testlibro por Ŝtata Lingvo-ekzameno**), verko de **d-ro Béla Mészáros** - reviziita de Tibor Papp. La 100-paĝan (A/5) plastoringe binditan kajeron eldonis Debrecena Bulteno (DB).

Jen ĝia okulfrape riĉa enhavo: Enkonduko - Gramatika resumo (de E-o) - 500 testofrazoj (kompletigendaj per unu el kvar donitaj solvovortoj) en dek partoj - Dek tekstoj por traduki al Esperanto - Kvinoble kvin direktitaj (laŭtemaj) formuladotaskoj - Solvoj de la alesperantaj traduktekstoj - Solvoj de la 500 testfrazoj - Solvoj de la direktitaj formuladoj - 70 ekzercofrazoj kun gramatikaj eraroj - 30+25 frazoj por traduki al Esperanto - Iliaj solvoj - Mez- kaj supergradaj parolsituacioj (75 temoj por paroli kaj paroli) - Superaj testfrazoj - Iliaj solvoj - Tri tekstoj por traduki al E-o - Mezgrada tasko por kontroli la tekstokomprenon de ekzamenato kaj ĝiaj kontroldemandoj - Fragmento el la n-ro 1990/17 de *Művelődési Közlöny* (Komunikaĵo pri Kleriĝo) pri la mezgrada instruado de fremdaj lingvoj - krome: Esperanto-tema novelo de Miklós Tóth-Máté, verkisto en Debrecen. Krome karikaturoj, ofertoj pri eldonaĵoj de DB, kaj reklamo pri DB plivalorigas la eldonaĵon. Ĉu skribi pli multon pri ĝi? Estu sufiĉa la informo, ke oni sukcese mezuras per ĝi sian lingvoscion kaj sukcese trapasas E-ekzamenon post ĝia trastudo, ne nur meznivele. Ĝi estas mendebla kontraŭ 300 HUF por adreso en Hungario, eventualaj interesiĝantoj en aliaj landoj - **ja pli ol duono de la volumo estas bone utiligebla ankaŭ de ne-hungaroj** - povas mendi ĝin kontraŭ 5 IRK. Tiuj ĉi mendoprezoj inkluzivas la sendkoston. Kontaktadreso: *s-ro Tibor Papp, Debrecen, Trombitás u.12. H-4031 Hungario.*

Priester

POKROVSKIJ, Sergio: KOMPUTIKA LEKSIKONO

Jekaterinburg: Sezonoj, 1995; 365 p., NLG 36.-

Studinte la relative multajn antaŭajn provojn de samfakaj esperantemuloj la aŭtoro alfabete listigas 1960 Esperantajn terminojn, zorge klarigas kaj parte komentas ilin. Referencoj helpas kompreni kaj lertaj fontindikoj altigas la kredindon. Fine de iu artikolo aperas la angla ekvivalento. Foje eĉ iuj alilingvaj terminoj - sed nur, se la verkanto opiniis necesa, pravigi nom-elekton, kiu ne sekvas la anglan modelon. En "kunfandita" angla+esperanta alfabeto (kiu do enhavas kaj la diakritojn kaj la literojn q,w,x,y) inter la kompletaj E-artikoloj miksiĝas 2020 anglaj terminoj kun E-ekvivalentoj. Tiel eblas trovi por anglaj komputikaj esprimoj Esperantan klarigon. Tiu metodo ankaŭ ŝparas spaco-rabajn indeksojn. Malgraŭ la indiko de la morfologia strukturo la abc-ordo estas tiom strikta, ke ekz. "*komput-il-o*" sekvas nur post la derivaĵoj "*komputila algebro*", "*~ arkitekturo*", "*~ klero*" *kaj* "*~ reto*".

La aŭtoro sekvas la modelon de mezlerneja leksikono, sed - kompreneble - ne celas nur studantojn, sed kolegojn komputikistojn, kiuj emas fake apliki E-on, kaj la eksterfakan publikon. Kvankam li moviĝas en "lerneja ĝenro", li mem substrekas, ke li aplikas metodon ne pedagogian rilate sinonimojn (kiuj ja ĝuste en la pritraktita fako fifamiĝis): li ne kaŝas sian opinion, donante la koncernan klarigon al sia preferata termino, sed lojale mencias ankaŭ la rivalojn - samloke, se la alfabeto tion permesas (kiel ekz. "*komputero, komputoro*" post *komputilo*" kaj "*datenoj, dataoj*" post "*datumo*") dum "*softvaro*" same kiel la tuj apuda angla "*software*" referencas al "*programaro*", kie oni trovas ne nur la klarigon, sed ankaŭ terminologian rimarkigon sub la simbolo ∧. Ofte post tiaj diskut-instigoj troviĝas koncernaj literatur-indikoj. Tiel la verko estas multe pli ol nura vortaro: ĝi ebligas ampleksan informiĝon pri la fako, multflankan enprofundiĝon en la temaron kaj eĉ ioman konatiĝon kun la argumentoj aperintaj en la akraj disputoj de la pasintaj jar(dek)oj. Certe la nuna kolekto ne estas "lasta vorto" kaj la terminoj, ĝis kiam en Esperantio okazos "normigo", restos "proponoj". Tamen estas esperinde, ke la granda plimulto da nedisputitaj, sed unuanime akceptitaj terminoj kreskos per vigla uzo de tiu ĉi valorega faka helpilo.

Iom kontraŭdira estas la ekstera formo: firm-kartonaj kovriloj, nigra kvazaŭledo kun oraj literoj, kiuj tamen facile perdiĝas. Kvankam pli kongrua al la enhavo - la leksiko de rapide evoluanta kaj ŝanĝiĝanta fako - bedaŭrindas la griza papero, kiu eble ne travivos sian dekan jaron.

Wera Blanke

Unuekzemplere ricevita:

Igre bez igrački (haiku) / Ludoj sen ludiloj (hajko). Ana Kušić. Zagreb: Sipar, 1996. 104 p. 21 cm. - Ilustrita libro, kun belaj, tri-liniaj poemetoj. Mendu ĝin ĉe la eldonisto: Sipar, Gajdekova 24, Zagreb. Tel. (385 1) 45 55 239

Ek al arabaj landoj! – alvoko –

Esperanto apenaŭ ekzistas en la arabaj landoj, ĉar mankas homoj, materialo, informado. Kiu interesiĝas estri komisionon pri arabaj landoj, kiel faris ekz. Hans Bakker por afrikaj landoj?
Necesas kontakti la jam esperantigitajn homojn, teni la kontaktojn kun ili, motivigi ili, propagandi, kompili la jam ekzistantajn materialojn, listigi trafajn argumentojn ktp.
Se vi estas aktiva homo, bonvolu kandidatiĝi, klarigante kial vi interesiĝas kaj kion vi povos fari. Skribu al

Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

Kiel uzi Mazi instrucele? - konkurso plilongigita

La konkurso anoncita en IPR (2/96 p.10-11.) estas plilongigita ĝis la fino de junio 1997. La Internacia E-Instituto (IEI) petas ankaŭ raportojn de la uzantoj de MAZI pri iliaj spertoj.
La vidbenda materialo estas adaptita por televida kurso. Ekde la 12-a de oktobro 1996 dissendas ĝin la unua programo de Pola Televido.
Adreso de Internacia Esperanto Instituto:
Riouwstr. 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando. Tlf./fakso: +31 70 3556677

Postparolo

Nia redakcio denove ricevis kelkajn malnovajn IPR-numerojn. Jen la aktuala mankolisto de nia kolekto: numeroj el la jaroj 1982-83, krome 80/1, 79/2-3, Specialaj numeroj el 1976 kaj 1973 kaj la numero 70/0.
Ekde la 1-a de januaro mi aliĝis al Internet. Momente mi povas nur sendi mesaĝojn, sed ricevi ne. Tamen mi aldonas jam nun mian retadreson, ĉar ene de kelkaj tagoj la adreso jam funkcios: jnemeth@alfa.compunet.hu. Mi daŭre atendas ankaŭ viajn faksojn. Bonvolu atentigi min telefone antaŭ faksado, aŭ sendu la fakson inter la horoj 6.45 kaj 7.15 (laŭ mez-eŭropa tempo), kiam mia komputilo aŭtomate akceptas faksojn.
Ĝis la promesita limdato, la 15-a de januaro, IPR estis prespreta. Sed intertempe mi ricevis peton de nia estrarano, Mag. Atilio Orellana Rojas, ke mi atendu la finon de la estrarkunsido en Parizo (pro la precizigo de la kostoj de ekskursoj en la aŭstralia konferenco). Tial mi sendis la revuon al la presejo nur la 20-an de januaro. Planita redaktofino por la sekva numero: la 15-a de aprilo 1997.

Jozefo Németh
redaktoro

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaniz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hungario: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 Lisboa
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Ruslo: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Pororoz.
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20, CH-2416 Les Brenets

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Bharato: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Danio: Wolgang Kirschstein, Hvedebjergvej 30, DK 8220 Brabrand
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box IR-13445-747, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, Pl.-50-952 Wroclaw
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Bašić (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Raymond Wylleman

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG.

Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la interan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@rik.bdtf.hu. Vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. (La teĥnikajn detalojn vi trovas en la Postparolo de la 96/2-a numero de IPR.) Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonajojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.